Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - 2060 Antwerpen - erkenningsnr. P005584 - ISSN 0772-456 X

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

44a jarkolekto, decembro 2023/12



## Pardonpetoj pro sklavigo

## Ĉu ankaŭ Niĝerio spertos puĉon?

## Ĉu etika bankado eblas?

# Muzeoj de Ukrainio en la milito




# En tiu ĉi numero

FOTO DE LA KOVRILO: RABIZO ANATOLII / SHUTTERSTOCK.COM


## el mia vidpunkto

▸ Pardonpetoj pro sklavigo 3

## politiko

**AFRIKO** 5
▸ Ĉu ankaŭ Niĝerio spertos puĉon?

**TURKIO** 7
▸ Intrigo de la pasintaj elektoj

**VENEZUELO** 9
▸ Maltrafita eblo

**ALBANIO/GREKIO** 12
▸ Polemikaj linioj dividas la maron

**IAEA** 13
▸ Irano reduktis la produktadon de riĉigita uranio

## moderna vivo

**KOREIO** 14
▸ Perdi la kuraĝon instrui

**SPORTO** 16
▸ Parkuro en Kubo

## ekonomio

**FINANCO** 17
▸ Ĉu etika bankado eblas? (2)

## komputado

**BITLIBROJ** 20
▸ PDF-libro: bela sed ne oportuna

## turismo

**MARVETURADO** 21
▸ Ŝipo de Hundertwasser

**ALBANIO** 22
▸ Pliiĝis la nombro de eksterlandaj vizitantoj

## spirita vivo

**OPINIO** 23
▸ Al kiu Dio preĝas Kiril?

## arto

**KULTURO KAJ MILITO** 24
▸ Muzeoj de Ukrainio en la milito (2014-2023)

**MUZIKO** 27
▸ Interesa sentokaoso



# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 44a jarkolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.
MONATO havas 64 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 68 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

**eldonejo:**
Vlaamse Esperantobond v.z.w. (Flandra Esperanto-Ligo), Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio; telefono: + 32 3 234 34 00; retpoŝto: eldonejo@monato.be; Skype: fel-monato; BE0419 028 122 - RPR Antwerpen; banko: BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1).

**abontarifo:**
La abontarifo varias laŭlande. Vd. en MONATO 2022/11, p. 32 kaj en monato.be/tarifoj.php aŭ petu ĝin de eldonejo@monato.be.

**retejo:** www.monato.be

**sociaj retejoj:**
X: @RevuoMonato
Facebook: facebook.com/revuo.Monato/
Telegramo: monato.telegramo.org
Youtube: www.monato.be/jutubo
Mastodon:@monato @esperanto.masto.host
Instagram: RevuoMonato

**honora ĉefredaktoro:**
Stefan Maul.
**ĉefredaktoro:**
Paŭl Peeraerts.
**reviziantoj:**
Edmund Grimley Evans, Jens S. Larsen, Frank Merla, Juan Carlos Montero Medina, Rob Moerbeek, Brian Moon, Fransoazo Noireau, Manolo Parra, Andrej Peĉënkin, Anna kaj Mati Pentus, Remuŝ, Antônio W. de Ruyter.

**faktokontrolanto:**
André Ruysschaert
**redakcia sekretario:**
Paŭl Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.be.
**grafiko:**
Zep Armentano, Ferriol Macip
**redaktoroj:**
- **Arto:** Aleksej Salomatov, Moskvo, arto@monato.be.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Belgio, ekonomio@monato.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Historio:** Trevor Steele, Aŭstralio, historio@monato.be.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, hobio@monato.be.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, Britio, komputado@monato.be.
- **Leteroj:** Paŭl Peeraerts, Belgio, leteroj@monato.be.
- **Libroj:** libroj@monato.be.
  Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propra-iniciate. La kunlaborantoj ricevos la recenzopetojn kaj la librojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Roberto Pigro, Kipro, lingvo@monato.be.
- **Literaturo:** Trevor Steele, Aŭstralio, literaturo@monato.be.
- **Medio:** Andrej Peĉënkin, Rusio, medio@monato.be.
- **Moderna vivo:** Norberto Díaz Guevara, Kubo, moderna_vivo@monato.be.
- **Politiko:** Massimo Ripani, Italio, politiko@monato.be.
- **Scienco:** Roberto Pigro, Kipro, scienco@monato.be.
- **Spirita vivo:** Alberto García Fumero, Kubo, spirita_vivo@monato.be.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, turismo@monato.be.

*Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantobond v.z.w,*
Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen.



VALERY SIDELNYKOV / SHUTTERSTOCK.COM

# Pardonpetoj pro sklavigo

Bert DE WIT
Nederlando

La 19an de decembro 2022 la tiama nederlanda ĉefministro, Marc Rutte, en speciala parolado oficiale pardonpetis pri tio, kio okazis en la pasinteco pri sklavigitoj, kiujn nederlandaj komercistoj aĉetis el Afriko aŭ Hindio kaj vendis al la estroj de kultivejoj pri sukero, kafo, tabako, k.s.

Fakte, komerco pri sklavigitoj ne estas tipe nederlanda afero. La britoj estis eĉ pli gravaj komercistoj pri sklavigitoj en la 16a ĝis la 19a jarcentoj. Entute pli ol 12 milionoj da sklavoj estis transportitaj de Afriko al la Amerikoj.

> Dum longa tempo la posteuloj de la sklavoj ne estis kompensitaj aŭ egalrajtigitaj, ĉar ili estis ofte nigraj aŭ alirasaj

La sistemo de laborigo de sklavigitoj en la kultivejoj estas abolita en Nederlando en 1863. Dum longa tempo la posteuloj de la sklavoj ne estis kompensitaj aŭ egalrajtigitaj, ĉar ili estis ofte nigraj aŭ alirasaj. En Usono ekzemple nur post la dua mondmilito la posteuloj ricevis la samajn rajtojn kiel la blankaj loĝantoj.

## Sklavigo: pasinta aŭ ne?

Sklavigo de unu speco de homoj fare de alia speco de homoj ne estas afero nur el la kolonia tempo. Jam en la antikveco, ĉe la grekoj, la romianoj, la vikingoj, sed ankaŭ ĉe otomanoj kaj aliaj popoloj, oni sklavigis homojn de alia deveno, por ke ili laboru por la estroj senpage kaj senrajte. Ankaŭ inter „indiĝenaj” popoloj estis sklavigitoj, kiuj devis labori senpage por siaj indiĝenaj estroj. En diversaj religioj kaj kulturoj sklavigo estas konsiderata sorto, kiu povas trafi homon, kaj kiun tiu devas toleri.

La socialistoj en la pasinta jarcento parolis pri „salajrosklavoj” indikante, ke fakte multaj homoj ne havas elekteblon por memstara kariero. Raportoj el 2016 de „Tutmonda

Sklavigo-Indekso" indikas, ke nuntempe ankoraŭ 40 milionoj da homoj vivas sklavigite.

## Kial tiom da sklavoj estis bezonataj?

En la 16a jarcento kaj poste la komerco tutmondiĝis. Novaj kontinentoj „malkovriĝis" kaj ankaŭ novaj produktoj. Okcident-eŭropaj komercistoj aĉetis ekzotikajn varojn de lokaj produktantoj. La eŭropa merkato postulis pli kaj pli. Oni povas kultivi tiujn varojn precipe en tropikaj regionoj. La invado de amerikaj teritorioj fare de hispanaj kaj portugalaj armeoj kaŭzis amasmortadon de lokaj loĝantoj pro kunportitaj malsanoj. Tiuj indiĝenoj, kiuj postvivis, fuĝis en la arbaron. La eŭropdevenaj invadintoj kreis kultivejojn de sukero, tabako, kafo, teo k.s., sed mankis indiĝenaj laborfortoj. Tiel ekestis la ideo transporti sklavigitojn el Afriko aŭ aliaj lokoj (ekzemple Hindio) al la amerika kontinento. Cetere, en la afrikaj regionoj de kie oni forkondukis la sklavigitojn, lokaj estroj estis engaĝitaj en la afero kun blankaj komercistoj pri sklavigitoj.

Tiel oni ekhavis sufiĉe da laboristoj por la grandaj kultivejoj. La sklavigitoj estis konsiderataj kiel varo, entute ne estis respektataj kaj multaj mortis dum la terura transporto trans la oceanon.

Estis kelkaj verkistoj kaj religiuloj, kiuj en la pasinteco forte kontraŭis la komercon pri sklavigitoj. En Nederlando ekzemple la verkisto Haafner, kiu forte atakis la nederlandajn praktikojn en libro en 1805 kaj ankaŭ akuzis anglojn pri intenca mortigo de sklavigitoj per malsatigo.

## Riĉaj per organizita komerco

Nederlandajn komercistojn pri sklavigitoj stimulis la Unuiĝintaj Orient-Hindia kaj Okcident-Hindia Kompanioj (en Britio estis similaj organizaĵoj), kiuj el tiu komerco akiris multe da mono. Ankaŭ diversaj riĉuloj en la lando akiris grandajn profitojn pro la komerco pri sklavigitoj. Unu ekzemplo estas sinjorino Borski en la komenco de la 19a jarcento, kies kapitalo devenis de komerco pri sklavigitoj. Ŝi estis unu el la fondintoj de la nederlanda banko, nun ŝtata instanco, kiu oficiale pardonpetis post esploro de sia rolo en la sklavokomerco.

Nuntempe la posteuloj de sklavigitoj volas scii, kiu(j) plej profitis el tiu komerco. Sendube estos malfacile fari kalkuladon kaj entute oni povas sin demandi, kio estu la celo. Pluraj urbestroj de nederlandaj urboj intertempe same pardonpetis pro tio, ke la urbestraroj ebligis la komercon pri sklavigitoj kaj profitis el tio. Kiel unua tion faris la amsterdama urbestrino Femke Halsema.

## Reĝaj pardonpetoj

La pardonpetoj de la ĉefministro en decembro 2022 ne sufiĉis por iuj organizaĵoj kaj personoj. Dum vizito al Arubo, insulo en la kariba regiono, la kronprincino aŭdis laŭtan deziron de studentino de la aruba universitato, ke la reĝo pardonpetu. Ŝi kantis malnovan sklavan himnon kaj kantante ŝi estis forportita.

Precipe en surinamdevenaj rondoj en Nederlando oni diris, ke kvankam oni aprezis la vortojn de la ĉefministro, oni volas, ke ankaŭ la reĝo petu pardonon pri la sklavigo de homoj en antaŭaj epokoj kaj pri la malbono farita en la nomo de la nederlanda reĝlando. Oni sciu, ke post la sendependiĝo de Surinamo en 1975 multaj surinamanoj preferis iri al Nederlando pro ekonomiaj kialoj. Tiuj surinamdevenaj homoj diris, ke la 1a de julio estas la plej bona dato por peti pardonon, ĉar en tiu dato oni oficiale abolis la sklavigan sistemon en 1863. *Keti Koti* estas la nomo de la festo, kiun oni organizas en tiu tago en pluraj urboj.

Kaj jen ... La reĝo Vilhelmo-Aleksandro la 1an de julio ĉi-jare pardonpetis pri la pasintaj kruelaĵoj kaj ekspluatado de homoj alirasaj. Li diris, ke li ordonos esploron pri tio, kiom la familio Oranĝo profitis el tiu sistemo de sklavigo.

La reagoj de la plimulto de la surinamdevenaj loĝantoj estis favoraj. Kelkaj postulas kompensan monon, sed por la plimulto plej gravas, ke la oficialaj reprezentantoj de la nederlanda ŝtato esprimis sian bedaŭron pri pasinta fiagado. Alilande, ekzemple en Britio, oni ankoraŭ ne estas tiom „matura" por oficiala pardonpeto. Same, en Belgio oni evitis tiun tiklan temon, ĉar oni timas postulojn pri kompensopagoj. Antaŭulo de la nuna reĝo kaŭzis sufiĉe da suferoj en Kongolando („lia kolonio"), tiel ke la nunaj regantoj belgaj evitas pardonpetojn.

Kaj kion pri francaj, hispanaj, portugalaj pardonpetoj? ■



**Ĉu vi havas propran vidpunkton pri la temo? Skribu al leteroj@monato.be.**

AFRIKO

# Ĉu ankaŭ Niĝerio spertos puĉon?


Gabriel **Olubunmi Òshó-Davies**
Niĝerio



*Laŭdinda pro la ĉesigo en Niĝerio de la milita regado kaj malstabileco estas Olusegun Obasanjo, kiu antaŭe regis la landon, unue kiel militista kaj poste kiel demokratie elektita prezidanto.*

FRIENDS OF EUROPE

Ekde aŭgusto 2020, kiam la militistaro akiris la povon en Malio, ses aliaj landoj, plejparte en Okcident-Afriko, sekvis jam la ekzemplon. Temas pri Ĉado (aprilo 2021), Ekvatora Gvineo (septembro 2021), Sudano (oktobro 2021), Burkino (januaro 2022), Niĝero (julio 2023) kaj Gabono (aŭgusto 2023). La sukcesaj militistaj puĉoj en kelkaj landoj ŝajnis instigi la militistojn en la aliaj landoj provi puĉon. La ĉefa celo de ĉi tiu mallonga eseo ne estas plene klarigi la kialojn de la puĉo en ĉiu lando, sed respondi la demandon en la titolo de la eseo. Kaj la respondo estas emfaze: *ne*!

En kelkaj el la supre menciitaj landoj, la prezidantoj regis jam dum jardekoj, kaj kiam ili mortas aŭ fariĝas tro maljunaj por regi, iliaj filoj heredas la postenon[1]. En kelkaj el tiuj landoj, la civitanoj vivas en ekstrema malriĉeco.

La nunaj ekonomiaj kaj politikaj situacioj igas puĉon ebla ankaŭ en Niĝerio, kiu nuntempe spertas senbridan inflacion. La nova registaro forigis subvencion je brulaĵoj tuj post transpreno de la antaŭa registaro. La elekta venko de la nuna prezidanto estas ankoraŭ kontestata de la opoziciaj partioj. Krome la homoj emas protesti pro altaj prezoj de varoj. Sed neniu eksplicite petas puĉon, ĉar ĉiuj scias, ke Niĝerio demokrate maturiĝis.

> La nunaj ekonomiaj kaj politikaj situacioj igas puĉon ebla ankaŭ en Niĝerio, kiu nuntempe spertas senbridan inflacion

> Sed neniu eksplicite petas puĉon, ĉar ĉiuj scias, ke Niĝerio demokrate maturiĝis

1. Ekzemple la klano-familio Bongo regis Gabonon dum 56 jaroj. Omar Bongo Ondimba gvidis la landon de 1967 ĝis sia morto en 2009. Lia posteulo iĝis la filo Ali. Dum la ekonomio stagnis, kaj la popolo vivis en malriĉeco, la familio Bongo amasigis kaj kaŝis eksterlande vastan riĉaĵon. (red.)

## Olusegun Obasanjo

Laŭdinda pro la ĉesigo en Niĝerio de la milita regado kaj malstabileco estas Olusegun Obasanjo, kiu antaŭe regis la landon, unue kiel militista kaj poste kiel demokratie elektita prezidanto.

## Instrua libro

En la libro *Making Africa Work* (Ni funkciigu




*En la libro* Making Africa Work *(Ni funkciigu Afrikon), eldonita en 2017, Obasanjo kunhavigas siajn spertojn.*

Afrikon), eldonita en 2017, Obasanjo kunhavigas siajn spertojn. Laŭ li ne gravas la ŝajne justaj kialoj de puĉo. Militista regado ne nur ĉiam havas malfavorajn efikojn sur demokratio, regado kaj unueco, sed ankaŭ malstabiligas la militistaron mem, ĉar ĝi subfosas la disciplinon, bonan ordon kaj militistan konduton.

## Bremsi korupton

Obasanjo substrekas ankaŭ la fakton, ke malpermesi puĉojn per la konstitucio ne estas la plej efika solvo. Necesas ankaŭ bremsi la korupton en la armeo. „Puĉo estas perfido puninda per morto, nur se ĝi malsukcesas, sed ĝi portas la komplotanton en la ŝtatdomon, se ĝi sukcesas.” notas Obasanjo en la libro.

Li priskribas la niĝerian situacion inter 1966 kaj 1999: „Suboficiro prenas pafilon, kaj rigardas sian politikan estron kaj altrangajn oficistojn tra ĝia celilo, forpuŝas ilin kaj poste metas sin en la Ŝtatdomon. Li tuj iĝas supera kaj pli altranga ol ĉiuj politikaj kaj armeaj oficiroj.”

## Deva emeritiĝo

Do, kiam Obasanjo revenis al la ŝtatdomo kiel demokratie elektita prezidanto, li lerte igis, ke altrangaj armeaj oficiroj deve emeritiĝu.

„Alpreninte la oficon kiel prezidanto, mi decidis ĉesigi ĉi tiujn senĉesajn militistajn puĉojn. Mi petis de la militistaro prezenti la liston de ĉiuj oficiroj, kiuj aŭ partoprenis en puĉoj en la pasinteco, aŭ profitis de la dividendoj de puĉo, estante nomumitaj al politika ofico kiel guberniestroj aŭ ministroj” Obasanjo rakontas en la libro.

## Nokto sen uniformo

Ne sciante la celon de la peto, la militistaro fidele kompilis kaj kunhavigis la liston al li, ĉefkomandanto kaj estro de ĉiuj branĉoj de militistaro laŭ la landa konstitucio. Iun vendredon 93 oficiroj ricevis seshoran avizon de emeritigo, kaj la ordonon ne pasigi tiun nokton en uniformo aŭ en kazerno.

„De mia pozicio kaj fono kiel batalprovita kaj militvenka generalo, mi sciis, ke oficiro sen uniformo kaj for de kazerno estas kiel fiŝo for de akvo.”

## Ekskludi, ne puni

Tamen, la deva emeritiĝo de tiuj 93 oficiroj ne malhelpis ilin eniri politikon, ĉar kelkaj el ili poste sukcese iĝis demokratie elektitaj guberniestroj. „Aliaj estis nomumitaj ministroj kaj ambasadoroj”, Obasanjo notas en la libro. La plano estis: ne puni ilin dumvive, sed ekskludi ilin de iliaj pozicioj en la armeo, kie ili povis esti danĝeraj.

## Plu neniu puĉo

Estas rimarkinde, ke depost la sendependiĝo en 1960 ĝis 1999, la plej longa periodo de demokratia regado estis ses jaroj – ĝuste la unuaj ses jaroj post la sendependiĝo.

Depost 1999 ne okazis puĉoj en Niĝerio: tio atestas pri la efikeco de la agado de Obasanjo kontraŭ la malstabiliga influo de la militistoj sur la politikan vivon de Niĝerio. ■



**“Naturista Vivo”**, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.


La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj.
Internacia Naturista Organizo Esperantista.
Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5.
Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

TURKIO

# Intrigo de la pasintaj elektoj



Andrey Bochkarev
Turkio



THEHAKANARSLAN / SHUTTERSTOCK.COM

La elektoj okazintaj en Turkio en majo vekis grandan intereson en la tuta mondo. La unuan fojon en la lastaj 20 jaroj opozicia kandidato proksimiĝis al venko super la ĝis nun populara turka gvidanto Recep Tayyip Erdoğan [reĝep tajip érdoan].

Por la aŭtoro, kiu dum multaj jaroj loĝas en Turkio kaj vidis la tempojn de la regado de Respublikana Popola Partio, kiam la nun reganta partio AKP ankoraŭ ne ekzistis sur la politika areno, estis plej interese rigardi la elektan vetkuradon, dum kiu aperis tre strangaj koalicioj. Tamen por kompreni la strangecon, necesas rememori iom da historio.

## Respublikana Popola Partio

La nuna ĉefa opozicia partio, Respublikana Popola Partio (*Cumhuriyet Halk Partisi* – CHP), estas la plej malnova partio en Turkio – ĝin fondis Atatürk en 1919. Ĝi apogis liajn ideojn pri eŭropigo kaj sekularigado de la socio. La partio de tempo al tempo inklinis al ŝtatismo kaj naciismo. Do, dum ĝia regado en Turkio ne ekzistis ŝtata televido en la kurda lingvo, kaj tiu lingvo estis, ĝenerale, sub implicita malpermeso.

## Partio de Justeco kaj Disvolvado

La reganta Partio de Justeco kaj Disvolvado (en la turka lingvo: *Adalet ve Kalkınma Partisi* – AKP) estas relative nova – ĝi estas fondita antaŭ iom pli ol 20 jaroj. Ĝia tiutempa gvidanto estis juna opoziciulo persekutita pro siaj islamismaj kredoj, pro kiuj li eĉ trafis en malliberejon. La partio oficiale ne refutas la ideojn de Atatürk, tamen ĝi ne penas sekularigi la socion kaj eĉ, male, subtenas religian edukadon. La partio ankaŭ ne kontraŭas membriĝon en Eŭropa Unio, sed ne intencas agi tiudirekte pro politikaj kialoj.

Fine de la 1990aj jaroj, sekve de la ekonomia krizo, ĉi tiu partio komencis akiri popularecon, precipe inter la loĝantaro de la provincoj. Kaj kiam estis malpermesite porti hiĝabon en ŝtataj institucioj, tio kaŭzis grandan ondon de malkontento, pro kio gajnis la nova partio, kaj Erdoğan, tiam malmulte konata, iĝis ĉefministro. Kun la helpo de kompetenta teamo de specialistoj li efektivigis ekonomiajn reformojn, kiuj kaŭzis rapidan altiĝon de la malneta enlanda produkto. Do en la fruaj 2000aj jaroj Turkio

okupis la unuan lokon en la mondo el la vidpunkto de la ekonomia kreskorapido.

Krome, Erdoğan parte solvis la problemon de la kurda separismo, ebligante la uzadon de la kurda lingvo en televido kaj en publikaj lokoj. Verdire, post la okazaĵoj en Ras Al-Ayn (kurda urbeto en Sirio), tiu problemo denove akriĝis, sed tio estas alia historio. Cetere, en la unuaj elektoj, kurdoj, kiuj havas propran partion, pli ofte subtenis la partion de Erdoğan ol la propran. Ĉar tiam ilia partio BDP (nun HDP) okupis maldekstrajn poziciojn, kio ne plaĉis al granda parto de la kurdoj, precipe al entreprenistoj.

## Partio de Nacia Movado

La tria grava politika forto en Turkio estis Partio de Nacia Movado (*Milliyetçi Hareket Partisi* – MHP), rekta kontraŭulo de HDP. Ĝi ne agnoskis la kurdojn kiel apartan etnon, ne opiniis, ke necesas la kurda lingvo en la ŝtataj televid-kanaloj. Ĝi ankaŭ kritikis Erdoğan pro „flirtado" kun la kurdaj separistoj. Subtenantoj de MHP eĉ supozis, ke la konduto de Erdoğan povas kaŭzi liberigon de Abdullah Öcalan el malliberejo kaj ke tiu fariĝos ĉefministro. Ni memorigu, ke Öcalan estis la estro de marksisma terorisma organizaĵo Kurdistana Laborista Partio (kurde: *Partiya Karkerên Kurdistan* – PKK), kiu iam estis fondita kun helpo de Sovetio. La rilaton de MHP kun HDP eblas esprimi per ŝerca diro populara en Turkio: „kiam MHP kaj HDP kreos koalicion" (t.e. temas pri io tute nereala). MHP suspektas, ke HDP estas la modera alo de PKK.

## Neatenditaj koalicioj

Tamen dum la antaŭa elekto-kampanjo MHP aliĝis al koalicio kun AKP, kiun ĝi antaŭe akre kritikis pro ties por-kurda pozicio inkluzive la decidon permesi al la nemortigitaj kaj nekaptitaj aktivuloj de PKK foriri al la teritorio de Iraka Kurdio. Sed la ĉefa intrigo estas, ke dum la nunaj prezidentaj elektoj al ĉi tiu koalicio aliĝis malgranda dekstrema por-kurda islama partio *Hür Dava Partisi*, kiu havas ligojn kun la libana-palestina Hizbulaho.

Parenteze indas mencii alian partion, kiu neniam eniris parlamenton kaj kies politikaj aspiroj estas konsiderataj talibecaj, ĉar ĝi estas la plej islamisma: *Saadet partisi*.

## Eĉ pli stranga koalicio


Plie estas eĉ pli interese: opone al tiu ĉi koalicio nomata *Cumhur İttifakı* (Popola Alianco) Respublikana Popola Partio kreis sian propran koalicion *Millet İttifakı* (Nacia Alianco) el ses partioj. Aldone al CHP mem, en ĝin eniris *İYİ Parti* (iam apartiĝinta disde MHP), *Saadet Partisi*, DEVA (antaŭe la plej liberala frakcio de AKP), *Demokrat Parti* (kemalismo, modera naciismo) kaj *Gelecek Partisi* (liberala dekstro), kiun kreis iama aliancano de Erdoğan, eks-ĉefministro Ahmet Davutoğlu. La kurda HDP penis aliĝi al ili, kaj okazis pluraj intertraktadoj pri la afero, sed la aliaj partioj ne povis atingi interkonsenton kaj, fine, HDP ne eniris la koalicion. Ĝiaj membroj subtenis kandidaton de la opozicia koalicio. Ĝi ankaŭ gajnis lokajn elektojn en pluraj regionoj de Turkio kaj verŝajne gajnos plurajn seĝojn en la parlamento.

## Plia surprizo

Plej surprize, la kandidaton de la koalicio *Millet İttifakı*, gvidata de la plej laika partio, prezentis al la elektontoj la estro de la plej islamisma partio (*Saadet Partisi*), Temel Karamollaoğlu.

## Marĝenaj partioj

Ĝenerale, en Turkio estas multaj politikaj partioj: ekzistas eĉ marksismaj komunista partio kaj laborista partio. Malkaŝe ekzistas ankaŭ por-rusia kaj por-ĉinia *Vatan Partisi*. Tamen en parlamentaj elektoj ĝi neniam ricevis pli ol 0,35 % de la voĉoj depost sia apero en 2015 kaj konsekvence ĝi neniam havis reprezentantojn en la nacia asembleo, samkiel la komunistoj aŭ „laboristoj". ■




Spektu la filmetojn
pri Monato en
www.monato.be/jutubo


JULIO LOVERA / SHUTTERSTOCK.COM

VENEZUELO

# Maltrafita eblo



Jezer **Dorante**
korespondanto de Monato en Venezuelo

Ekde la komenco de la 21a jarcento la venezuela opozicio perdis multe da tereno en la politika kampo. En januaro 2019, post la trompaj balotoj de 2018, juna kaj nekonata politikisto leviĝis kiel espero por milionoj da venezuelanoj. Lia nomo: Juan Guaidó. Lia gvidado komenciĝis publike post kiam la Nacia Asembleo, elektita en 2015, nomumis lin prezidanto.

## Nova prezidanto

Kiel tio okazis? La parlamento per interpreto de artikolo 233 de la konstitucio deklaris „absolutan foreston" de Nicolás Maduro pro la trompaj rezultoj de la balota procezo de 2018. Laŭ la konstitucio „Absolutaj forestoj de la prezidanto de la respubliko estos: lia morto, lia eksiĝo, aŭ lia eksigo dekretita per verdikto de la Supera Kortumo, lia konstanta korpa aŭ mensa nekapablo atestita de medicina komisiono nomumita de la Supera Kortumo kun la aprobo de la Nacia Asembleo, forlaso de la posteno, deklarita kiel tia de la Nacia Asembleo, same kiel popola revoko de lia mandato. Kiam la elektita prezidanto tute forestas antaŭ ol ekofici, nova universala, rekta kaj sekreta elekto okazos ene de la sekvaj tridek tagoj. Dum la novelektita prezidanto ankoraŭ ne enoficiĝas la prezidanto de la Nacia Asembleo[1] estas respondeca pri la prezidanteco de la respubliko".

La 23an de januaro 2019 Guaidó estis konfirmita kiel prezidanto de Venezuelo en la ĉefa Placo Bolivar de Karakaso. En la sekvaj tagoj pli ol 125 landoj montris sian apogon kaj agnoskis lin kiel „portempan prezidanton de Venezuelo". De tiam komenciĝis krizo en la sudamerika lando, kaj post tio la mondo devis elekti inter agnoski Maduro aŭ Guaidó kiel prezidanton.

1. En 2019 tiu estis Juan Guaidó.

## Internacia subteno

Liaj planoj estis simplaj: fini la diktaturan registaron de Maduro, kaj lanĉi novan balotan procezon por ĉesigi uzurpon. La ĉefa subtenanto de lia prezidanteco estis Usono per la tiutempa prezidanto Donald Trump. Ankaŭ aliaj landoj subtenis lin diversmaniere, ĉar li reprezentis esperon por redoni demokration al la lando.

Inter la amerikaj landoj, kiuj apogis al Juan Guaidó estis: Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Ekvadoro, Gvatemalo, Gujano, Honduro, Kanado, Kolombio, Kostariko, Panamo, Paragvajo, Peruo, Sankta Lucio, Usono kaj Urugvajo. Ankaŭ ĉiuj membroŝtatoj de Eŭropa Unio subtenis la junan politikiston. Li do havis gravan apogon de diversaj landoj por plenumi siajn celojn kaj siajn promesojn.

## Netrafita eblo

Post tia rekono ĉirkaŭ la mondo, Juan Guaidó havis plej grandan eblon redoni demokration al Venezuelo kaj ĉesigi la 20-jaran regadon de la maldekstra registaro en la lando. Tamen, ne ĉio perfektas. Ne ĉio okazas kiel oni deziras aŭ esperas. La komencon de la portempa prezidanteco makulis diversaj cirkonstancoj: korupteco, misuzo de humanitara helpo sendita el diversaj landoj, mensogoj, misuzo de mono ktp. Kaj tiaj aferoj malkreskigis la apogon nacian kaj internacian.

## Reen al Maduro

Guaidó kaj lia grupo de politikaj partioj ne sciis, kiel alfronti la situacion, kaj tio okazigis diversajn malsukcesojn por la venezuela opozicio. Leopoldo López, la opozicia politika gvidanto (kaj mentoro de Juan Guaidó) forlasis la hispanan ambasadejon en Karakaso, kaj sukcesis atingi Madridon por establi sian loĝejon tie; la komisiito pri eksterlandaj rilatoj, Julio Borges, eksiĝis de sia posteno; en 2022 diversaj landoj diskrete ĉesis rekoni Guaidó kiel „portempan prezidanton"; Usono sendis altnivelan mision al Karakaso, formitan de konsilistoj de la Blanka Domo, por fari rektan dialogon kun la registaro de Nicolás Maduro; sed usonaj delegitoj evitis renkontiĝi kun Guaidó.

Bedaŭrinde tiaj okazaĵoj malfortigis la venezuelan opozicion kaj fortigis la registaron de Maduro, kun rezulto, ke en la sekvaj monatoj iom post iom la popolo ekperdis fidon kaj esperon en Guaidó. Kvankam li daŭre parolis pri la fino de la diktatura registaro de Maduro kaj okazigo de nova balota procezo, tia diskurso perdis apogantojn, kiam ili ne vidis favorajn rezultojn. Post tio, dum tri jaroj lia portempa prezidanteco fariĝis iluzio, kiun la popolo memoras nun kiel la plej grandan ŝancon por faligi la registaron de Nicolás Maduro. ■

# KRONOLOGIO DE KATASTROFO

**5a de januaro 2019**: La nekonatan Juan Guaidó enoficigis kiel prezidanton la Nacia Asembleo elektita en 2015. Antaŭ la nomumo, la juna gvidanto de la partio Popola Volo (fondita de la nun ekzilita Leopoldo López) ne havis signifan agadon kiel deputito. La decido, ke li okupu la prezidantecon estis ligita al rotacia interkonsento inter la partioj, kiuj triumfis en la parlamentaj elektoj kaj prenis superecon en la venezuela parlamento: Demokrata Agado, Nova Tempo, Unue Justeco kaj Popola Volo.

**23a de januaro 2019**: Guaidó kaj la subtenantaj partioj decidis proklami provizoran registaron. Guaidó fariĝis „provizora prezidanto". Post rapida decido de la usona registaro, tiam estrata de Donald Trump, rekonanta Guaidó kiel legitiman prezidanton, okazis monda rekono.

**23a de februaro 2019**: Okazis granda mobilizado ĉe la landlimo kun Kolombio por ricevi humanitaran helpon el diversaj partoj de la mondo. Prezidantoj de pluraj landoj partoprenis, kaj en Cúcuta (Kolombio) okazis grandega koncerto: *Venezuela Aid Live.* Tamen, armitaj grupoj, ligitaj al la registaro de Maduro, malhelpis la eniron de tia humanitara helpo al la venezuela teritorio; dume, la registaro de Maduro dekretis fermon de la landlimoj kun Kolombio, dekreto kiu estos nuligita nur fine de 2022.

**30a de aprilo 2019**: Sub la nomo „Operaco Libereco" Guaidó kaj la antaŭe malliberigita Leopoldo López gvidis tion, kion ili nomas civil-armea ribelo ekster armea bazo en Karakaso. Tiu ĉi ago, kiel konfirmite de la aliaj por-demokratiaj partioj, estis farita sen ilia konsento. Post la malsukcesa operaco, López rifuĝis en la hispana ambasadejo.

**26a de novembro 2019**: La opinisonda firmao Delphos konstatis signifan malkreskon de la kredindeco de Guaidó en la publika opinio de Venezuelo. Post 65 % da subteno en marto, en la antaŭlasta monato de 2019, nur 45 % kredis, ke la juna opozicia gvidanto kapablas gvidi la landon al demokratio.

**5a de januaro 2020**: Guaidó estis reelektita de la parlamento kiel prezidanto.

**11a de februaro 2020**: Guaidó, kiu forlasis la landon inkognite trans la landlimon kun Kolombio, revenis al Venezuelo post trisemajna turneo en Eŭropo kaj Usono. En ĉi tiuj kontaktoj, la subteno de la demokrata komunumo al la figuro de Guaidó estis reasertita, kun klara subteno de la registaro de Trump.

**31a de marto 2020**: Usono anoncis ŝanĝon de sia oficiala politiko pri Venezuelo. Post periodo en kiu Vaŝingtono minacis pri ebla armea invado por faligi la registaron de Maduro, la ministro pri eksterlandaj aferoj, Mike Pompeo, asertis, ke lia registaro serĉos politikan solvon sed en direkto al „maksimuma premo" kontraŭ la reĝimo de Nicolás Maduro.

**31a de aŭgusto 2020**: Politikistino Maria Corina Machado publike rompis ligojn kun Juan Guaidó. Machado rememorigis al la „provizora prezidanto", ke lia celo estas renversi la reĝimon de Maduro: „La lando donis al vi taskon, kiun vi ne povis aŭ ne volis plenumi".

**24a de oktobro 2020**: La opozicia politika gvidanto Leopoldo López, konsiderata kiel la mentoro de Guaidó, subite forlasis la hispanan ambasadejon en Karakaso, kie li ricevis protekton ekde 2019, kaj sukcesis atingi Madridon, por establi tie sian loĝejon.

**1a de decembro 2020**: Okazis la unua publika eksiĝo de diplomatia reprezentanto nomumita de Guaidó. Temis pri Vanessa Neumann, delegito en Britio, kiu rezignis sian postenon,

menciante „dubojn ene de la opozicio” pri la estonteco de la figuro de „provizora registaro”.

**26a de aprilo 2021**: Post la unuaj 100 tagoj de la nova demokrata registaro de Joe Biden, evidentiĝis 180-grada turniĝo en la strategio por trakti ĉavismon. La nova registaro ŝanĝis la ripetiĝantan kaj publikan premon de Trump kontraŭ Maduro, kaj konstruis pontojn kun Eŭropa Unio kaj Kanado por plurflanka aliro al la venezuela krizo. Vaŝingtono konfirmis sian subtenon al Guaidó, sed evitis nomi lin provizora prezidanto.

**12a de majo 2021**: Juan Guaidó sciigis pri sia intenco nomumi delegacion por trakti pri ĉavismo kun la perado de Norvegio.

**7a de oktobro 2021**: La neregistara organizaĵo Internacia Travideblo petis, ke Guaidó estu respondeca pri la administrado de la financoj: „la manko de travidebleco publike denuncita de altrangaj oficistoj – nunaj kaj emeritaj – de la provizora registaro, kaj diversaj raportoj, antaŭsupozas netravideblan administradon de publikaj financoj, fare de la provizora registaro gvidata de Juan Guaidó”.

**6a de decembro 2021**: La provizora registaro de Juan Guaidó suferis gravan malsukceson. La tiama Komisiito pri Eksterlandaj Rilatoj, Julio Borges, eksiĝis kaj atentigis, ke la provizora figuro devas malaperi kaj ke oni devas pripensi novan strategion por batali favore al demokratio en Venezuelo.

**5a de januaro 2022**: Post la rezultoj de la elektoj, pridubitaj de la opozicio, en la Nacia Asembleo sidis plejparte ĉavistoj. Samtempe, Juan Guaidó estis konfirmita kiel „provizora prezidanto” de la parlamento elektita en 2015 (kiun li asertis esti laŭleĝa). Post tio, en la sekvaj monatoj, diversaj landoj ĉesis rekoni Juan Guaidó kiel „provizoran prezidanton”, sed li insistis daŭrigi tiun strategion.

**31a de januaro 2022**: Juan Guaidó anoncis gravan turniĝon. Post insistado dum pluraj jaroj pri sankcioj por premdevigi la foriron de Maduro, li anoncis, ke li petos de Usono mildigi sankciojn kontraŭ ĉavismo kun la celo devigi ilin kunsidi por trakti kun la opozicio.

**6a de marto 2022**: Usono sendis altnivelan delegitaron al Karakaso por starigi rektan dialogon kun la registaro de Nicolás Maduro. La usonaj delegitoj evitis renkontiĝi kun Guaidó.

**16a de majo 2022**: Opoziciaj partioj en Venezuelo konsentis okazigi antaŭelektojn. Rilate al la prezidantaj elektoj de 2024, ili ekskluzivigis subteni la kandidatecon de Guaidó kiel opozicia figuro kontraŭ Nicolás Maduro, kiu jam deklaris, ke li celos reelekton.

**30a de decembro 2022**: La tiel nomata G-4 aŭ kvaropa grupo, konsistanta el la partioj Demokratia Agado, Nova Tempo, Unue Justeco kaj Popola Volo, kiuj ricevis plimulton de la popola voĉdono en la parlamentaj elektoj de 2015, montris publike sian disiĝon post kiam tri el la kvar partioj voĉdonis favore al ĉesigo de „provizora registaro”. Juan Guaidó do ne plu estas la ĉefa referenco de la por-demokratia opozicio en Venezuelo. Nur la partio Popola Volo (en kiu Guaidó estas membro) voĉdonis kontraŭ la forigo de la „provizora registaro”.

**24a-25a de aprilo 2023**: Guaidó komunikis per Twitter sian eniron en kolombian teritorion, kaj anoncis, ke li petos renkontiĝojn kun la ĉeestantaj delegacioj kadre de internacia konferenco organizita de la kolombia registaro de Gustavo Petro, kiu konsideras lian ĉeeston malprudenta kaj instigas lin foriri el Kolombio. Li konfirmis sian vojaĝon al Miamo (Usono) kaj de tiu urbo li donis siajn unuajn deklarojn pri tio, kio signifis la komencon de lia ekzilo.

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



# Donackupono

**Donaco** por via korespondamiko?
**Donaco** por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?
**Donaco** por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de Monato! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

**Ekzistas tri versioj**

1) La kupono de **15,00 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.

2) La kupono de **30 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.

3) La kupono de **60 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian Monato-donackuponojn nun ĉe Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe **monato@fel.esperanto.be.**

ALBANIO/GREKIO

# Polemikaj linioj dividas la maron


BSG_1974 / SHUTTERSTOCK.COM


Bardhyl Selimi
korespondanto de Monato en Albanio

Artikolo 2 de la greka leĝo 2321/1995 ratifanta la Konvencion de Unuiĝintaj Nacioj pri Marjuro[1] asertas, ke „Grekio konservas la neforigeblan rajton laŭ artikolo 3 de la ratifita Konvencio etendi en ajna momento sian teritorian maron ĝis 12 marmejloj". La turka parlamento en la sama jaro avertis la najbaran landon, ke tia plivastigo estus konsiderata kiel militkaŭzo (latine: *casus belli*).

La plimulto de la insuloj en Egea Maro apartenas al Grekio, kaj pro tio Turkio ne povas etendi sian regadon trans kelkajn marmejlojn de sia marbordo. La disputoj reakriĝis en 2020, kiam Turkio komencis hidrokarbon-esploradprojektojn proksime de la grekaj insuloj Rodoso kaj Kastelorizo.

Se oni aplikus la principon laŭvorte, Albanio similе perdus grandan parton de sia maro kaj ekskluziva ekonomia zono. En 2009, sub la premo de greka vetoo por la aliĝo de Albanio al NATO (la afero estas publika danke al *Wikileaks*), la tiama albana registaro, gvidata de Sali Beriŝa, akceptis interkonsenton, kiun subskribis la ministro pri eksteraj aferoj Lulzim Baŝa kaj lia greka kolegino Dora Bakoyannis. La interkonsento poste estis nuligita de la albana konstitucia kortumo, kiu argumentis, ke marborda lando rajtas je 12-mejla interna kaj teritoria akvaro, kiu ne povas esti cedita al alia lando.

En 2020 Grekio kaj Albanio anoncis, ke ili taskos la Internacian Kortumon pri la solvado de la disputo. Du jarojn poste, ambaŭ landoj interkonsentis pri la plirapidigo kaj kompletigo de la teknikaj aferoj, por ke kompromiso estu prezentita al la Internacia Kortumo. ■

1. Montego Bay 1982 (red.)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom
lkk@free.fr
Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat, Trevor Steele, Ian Fantom ktp.
Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

IAEA

# Irano reduktis la produktadon de riĉigita uranio



Evgeni **Georgiev**
korespondanto de Monato en Vieno

Laŭ raporto de Internacia Atom-Energia Agentejo (IAEA), kiu havas sidejon en Vieno, en la pasintaj monatoj Irano malpliigis la produktadon de riĉigita uranio. Samtempe Irano blokas interkonsentitajn paŝojn por pli intensa kontrolado de ĝia nuklea programo.

En la pasinta kvaronjaro la islama respubliko pliigis sian provizon de uranio kun preskaŭ armiltaŭga riĉigiteco je 60 % de nuraj 13,9 kg ĝis 121,6 kg.

Lige kun tio duoniĝis la kresko kompare kun la antaŭa kvaronjaro. Laŭ atomfakuloj per 50 kg da riĉigita uranio oni povus produkti atomarmilon, se la materialo estus riĉigita ĝis 90 %.

## 23-oble pli da riĉigita uranio

Laŭ la direktoro de IAEA, Rafael Grossi, Irano ne disponigis aliron al la registroj de la observokameraoj, kiuj estis instalitaj en majo. Krome li kritikis, ke Teherano rifuzis vizojn al inspektistoj. Pri la klarigo de problemoj rilate al la pasintaj atomaj aktivaĵoj ne estis atingita progreso.

Irano havas intertempe 23-oble pli da riĉigita uranio ol estis interkonsentite en 2015. La kvanto sumiĝas je 4,74 tunoj. Tio estas multe pli ol la interkonsentita kvanto de 202,8 kg laŭ la atomtraktato de 2015.

La islama respubliko posedas interalie 435 kg de 20-procenta uranio, 48 kg pli ol en la lasta kvaronjaro de 2022. La kvanto de 60-procenta uranio pliiĝis je 25 kg kaj nun estas 88 kg. Teherano ĉiam emfazas, ke ĝi interesiĝas pri paca nuklea teknologio.

## Alte riĉigita uranio trovita

Komence de la jaro IAEA trovis en Irano partiklojn de alte riĉigita uranio. Ĝi havis riĉigitecon de 83,7 %. Tiu valoro estas tre proksima al la 90 %, kiuj estas bezonataj por produkti atomarmilojn. Tiujn spurojn oni malkovris en januaro dum inspektado de instalaĵo por riĉigo de uranio en Fordo.

La iranaj aŭtoritatoj klarigis al IAEA, ke la ekstrema riĉigo ne estis planita. Grossi indikis, ke Irano disponas pri sufiĉe da riĉigita uranio por produkti atomarmilojn.

## Forlasita traktato

En 2015 Britio, Ĉinio, Francio, Germanio, Rusio kaj Usono subskribis kun Irano atomtraktaton. La subskribantaj landoj deklaris sian pretecon iom post iom nuligi siajn sankciojn kontraŭ Teherano, kondiĉe ke la interkonsento estu observata. Laŭ ĝi la Islama Respubliko povas uzi nuklean energion nur civilcele. Irano konsentis riĉigi uranion ĝis 3,67 %. La traktato intencas malebligi la produktadon de atomarmiloj en la islama respubliko.

Sub la antaŭa usona prezidento, Donald Trump, en 2018 Usono tamen unuflanke forlasis la malfacile atingitan interkonsenton, enkondukis severajn sankciojn kaj blokis iranajn bankkontojn. Poste ankaŭ Irano iompostiome retiriĝis el siaj devontigoj lige kun la atomtraktato.

Fine de novembro 2021 Irano komencis interparolojn kun Britio, Ĉinio, Francio, Germanio kaj Rusio cele al revivigo de la atomtraktato. Ili malsukcesis. ■

KOREIO

# Perdi la kuraĝon instrui



Cho Sung Ho
korespondanto de Monato en Koreio



*La sinmortigo de juna instruistino skuis Koreion, kaj okazis amasaj protestoj kontraŭ la instrusistemo.*

NEWS1

La sinmortigo de juna instruistino en Koreio estigis landskuan emocion, kio rezultigis ĉiunivelan reformadon de leĝoj kaj regularoj por protekti la instruistajn rajtojn.

La 18an de julio 2023 23-jara instruistino de bazlernejo troviĝis mortinta en senhoma klasĉambro de sia lernejo. Kvankam ŝi postlasis neniun skriban klarigon, oni konkludis, ke ŝi ĉesigis sian propran vivon. Tuj post la incidento vastiĝis la onidiro, ke ŝi ofte suferis pro plendoj de gepatroj de siaj lernantoj.

## Antaŭaj faktoj

Laŭ kolegino, la instruistino – kiu ekoficis en 2022 – konfidis al ŝi sian aflikton, ke la laboro estas dekoble pli ŝarĝa en 2023 ol en la unua jaro. Oni suspektas, ke turmentis ŝin precipe la tiel nomata „krajona incidento” okazinta kvin tagojn antaŭ ŝia forpaso, kiam en ŝia klaso lernanto gratvundis per krajono la frunton de alia, kies gepatroj venis al la lernejo kaj riproĉis la instruistinon per humiligaj vortoj. Ankaŭ la gepatroj de la vundinto protestis al ŝi per tekstaj mesaĝoj kaj telefonvokoj por defendi sian infanon. Plej probable ŝi ne povis elteni aferon tro pezan por juna novulo.

Fakte la incidento ne estas la unua, kiu daŭrigis la tragedion de instruistoj. Cent instruistoj de publikaj

lernejoj mortigis sin dum la lastaj ses jaroj, kaj multaj aliaj forlasis sian postenon pro similaj aferoj.

## Reagoj

Instruistoj tra la tuta lando tuj protestis, postulante la restarigon de instruistaj rajtoj. Korea Federacio de Instruistaj Asocioj anoncis: „Ni konsideras tre serioza la nunan situacion, ne nur pro la terura atenco kontraŭ la rajtoj de instruisto, sed pro la kolapso de la tuta sistemo de publika instruado. Ni kontraŭstaros per ĉiuj niaj rimedoj senskrupulajn raportojn pri mistraktado de infanoj kaj senbazajn malicajn plendojn”. La registaro rapide reagis al la akra etoso en instrusferoj. La vicĉefministro kaj ministro pri edukado Lee Ju-ho firme deklaris, ke la incidento estas grava damaĝo al la instrusistemo.

## Kaŭzoj

Fakuloj kulpigas la regularojn rilatajn al rajtoj de lernantoj. Ili asertas, ke neglektiĝas la rajtoj de instruistoj, dum oni tro emfazas protekti tiujn de lernantoj. Enketoj rezultigis, ke dum la lastaj kvin jaroj pli ol 70 % de la instruistoj spertis malobservadon de instruistaj rajtoj, kaj kvarono bezonis psikiatran atenton.

Plie, la leĝo pri infanbonfarto, kiu malpermesas mistraktadon kontraŭ la mensaj sano kaj disvolviĝo de infanoj, aplikiĝas tro vastasence en la instrukampoj tiel, ke gepatroj misuzas ĝin por raporti aŭ procesi kontraŭ instruistoj. La sekva okazo ekzemplas, kiom grava estas la problemo. Instruisto, kiu donis laŭdan glumarkon al lernanto pro ties bonfaro, estis priraportita de la gepatroj de alia lernanto. Ili insistis, ke ilia infano estas mense vundita, ĉar ĝi ne ricevis laŭdan glumarkon.

> La 18an de julio 2023 23-jara instruistino de bazlernejo troviĝis mortinta en senhoma klasĉambro

> Cent instruistoj de publikaj lernejoj mortigis sin dum la lastaj ses jaroj

> Instruistoj tra la tuta lando tuj protestis, postulante la restarigon de instruistaj rajtoj

> Fakuloj kulpigas la regularojn rilatajn al rajtoj de lernantoj

## Novaj reguloj

Post esplorado la ministrejo pri edukado publikigis tekston por protekti la rajtojn de instruistoj, kiu validas ekde la unua de septembro. Ĝi enhavas instrukciojn pri la maniero gvidi la lernejan vivon de lernantoj.

Laŭ la teksto instruistoj povas admoni gepatrojn al inspektado, konsilado kaj kuracado de lernantoj por forigi ties problemojn. Instruistoj havas la rajton rifuzi kunsidi kun gepatroj, kiam la kunsido ne estas interkonsentita aŭ kiam ĝi okazos post la laborhoroj.

La teksto diras ankaŭ, ke lernantoj ne uzu poŝtelefonon dum la lecionoj, kaj ke instruistoj rajtas konfiski la aparaton, se lernantoj ne observas la malpermeson. Instruistoj rajtas apartigi disde la aliaj tiujn lernantojn, kiuj malhelpas la instruadon kaj, se la konduto daŭras, venigi ilin al la kuratoroj. Cetere instruistoj rajtas kontroli posedaĵojn de lernantoj kaj postuli, ke ili skribu tekston pri la misfaroj.

## Leĝdonaj aktoj

La edukadkomisiono de la nacia asembleo preparas kvar aktojn por apogi la protektadon de instruistaj rajtoj. Inter la plej gravaj aferoj la novaj aktoj instrukcios, ke instruistoj priraportitaj pro mistraktado de infanoj ne tuj maldungiĝu sen pravigeblaj kaŭzoj, kaj ĝusta gvidado de la lerneja vivo de lernantoj estos imuna al tia mistraktado sub la leĝo pri infanbonfarto. Cetere, la lernejestro – ne unuopaj instruistoj – respondecos trakti plendojn, kiuj rilatas al instruaj agoj. Krome, la aktoj konsideros malicajn plendojn malobservado de instruistaj rajtoj.


En la lastaj kvar tagoj, dum la verkado de ĉi tiu artikolo, okazis sinmortigoj de tri pliaj instruistoj. Oni ne plu aŭdu instruistojn diri „Ni perdis la kuraĝon instrui”. ■



**Cho Sung Ho** estas emerita profesoro pri biologio kaj aktivis en la movado kiel ĉefredaktoro de *La Espero el Koreio* kaj kiel vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio.

SPORTO

# Parkuro en Kubo



PARKOUR CUBA


Juan Carlos **Montero Medina**
korespondanto de Monato en Kubo

Internacia Gimnastika Federacio (france *Fédération Internationale de Gymnastique*, FIG) akceptis novan sportan kategorion: parkuron[1] aŭ „la arton de kurado”, kaj en Kubo oni jam praktikas ĝin tutlande sub la gvidado de Kuba Federacio pri Gimnastiko.

La komisiito pri arta gimnastiko en Kubo, licenciulo Pedro Pablo Barrios, sciigis, ke jam okazis kurso pri la fako, kiun oni ĝis nun spontanee praktikis kiel ŝatokupon. Dek ok personoj – precipe metodikistoj – ĉeestis la menciitan kurson. Ili devas transdoni en siaj provincoj la sciojn ricevitajn.

## La sporto

Parkuro estas la arto trairi de unu loko al alia per la plej simplaj kaj efikaj manieroj, superante obstaklojn en la ĉirkaŭaĵo per korpaj lertaĵoj. Ĝi estas konsiderata ekstremsporto.

La praktikantoj devas salti, grimpi, ruliĝi, kuri, rampi kaj fari ĉiun ajn movon postulatan de la ĉirkaŭaĵo.

Oni kombinas lertecon, forton, reziston, koncentriĝon, kunordigon de la korpaj movoj kaj antaŭ ĉio multe da imago. Ne ekzistas reguloj pri la movoj, ili estas tute liberaj, sed nepras la krepovo kongrua kun la ĉirkaŭaĵo. Sed por bonega agado oni devas nepre transiri barilojn, fari precizajn saltojn, radsaltojn, murgrimpadojn kaj mildigi la surteriĝojn.

## Origino

Tiu ĉi sporto aperis en la ĉirkaŭaĵo de Parizo en la 80aj jaroj de la pasinta jarcento danke al Raymond Belle. Poste aliĝis lia filo David Belle kaj lia grupo de amikoj, nomita *Yamakasi*.

Tutmonda Asocio pri Parkuro (angle *Parkour Worldwide Association*, PAWA) estis fondita de David Belle kun la celo diskonigi kaj evoluigi parkuron tra la tuta mondo.

La populareco de la sporto ĉe junuloj en diversaj mondopartoj estiĝis inter 1990 kaj 2000 danke al filmoj, dokumentfilmoj kaj televidaj reklamoj.

La unua monda parkuro-konkurso okazis en Tokio de la 14a ĝis la 16a de oktobro 2022. ■

En Kubo oni praktikas parkuron tutlande sub la gvidado de Kuba Federacio pri Gimnastiko

Parkuro estas la arto trairi de unu loko al alia per la plej simplaj kaj efikaj manieroj

La unua monda parkuro-konkurso okazis en Tokio

1. Parkuro (plurlingve *parkour*) estas trejna disciplino, kiu uzas moviĝojn origine venintajn el armea obstaklokura trejnado.


**Juan Carlos Montero Medina** estas kuba emerita kontisto. Li naskiĝis en 1957 kaj loĝas en Havano.

FINANCO

# Ĉu etika bankado eblas? (2)

Roland Rotsaert
korespondanto de Monato en Belgio


NATEE MEEPIAN / SHUTTERSTOCK.COM

Eble la unua demando estu: ĉu nuntempe eblas fondi bankon? La kondiĉoj por krei novan bankon tute ne plu estas kiel antaŭ jarcento. La reguloj kaj teknikaj rimedoj tiom kompleksiĝis, ke nur la preparaj laboroj postulas plurajn jarojn kaj startkapitalon kolekteblan nur ĉe amaso da investantoj. Kaj se oni finfine sukcesas akiri la bezonatajn licencojn kaj la ekipaĵojn kaj la necesan aldonan kapitalon, oni esperu ke efektive venos klientoj …

## *NewB*

En Belgio la eksperimento okazis. Pro malkontento pri la malboniĝantaj servoj kaj la altiĝantoj kostoj de la grandaj bankoj, en 2011 grupeto de entuziasmuloj decidis fondi novtipan bankon, kiu proponu ĉiujn bazajn bankservojn, bonkvalitajn, ne kompleksajn, je modera kosto. Kvankam „etiko" estis menciita inter la celoj, ĝi ne venis unualoke; jam ekzistis en la lando filio de la nederlanda banko *Triodos*, ĉe kiu etiko plej gravas.

Estis fondita kooperativa societo *NewB*, kiu, malgraŭ intensaj reklamkampanjoj, bezonis jarojn por trovi la bezonatan kapitalon. En 2020 *NewB* finfine akiris licencon, sed nur partan, ĉar ne tute kolektiĝis la bezonataj aldonaj 40 milionoj da eŭroj da kapitalo. Dum la preparaj jaroj, kiam estis nur kostoj, ne enspezoj, forvaporiĝis minimume 27 milionoj.

Je la fino estis 20 000 klientoj, kiuj sume deponis 180 milionojn da eŭroj. Estis 117 000 akciuloj, el kiuj la plimulto aĉetis nur unu akcion je 20 eŭroj; la grandaj investantoj estis (duon-) publikaj instancoj el franclingva Belgio. Je la jarfino de 2020 la iniciatintoj de *NewB* rezignis. VDK, malgranda banko el la nederlandlingva parto de Belgio, transprenis la klientaron de *NewB*, kiu ĉefe loĝas en la franclingva landoparto. *NewB* pluvivas kiel filio de VDK. Kiom restas por la akciuloj de *NewB* nur post kelkaj jaroj kalkuleblos, sed estos nur kelkaj procentoj de la investita sumo.

**Seguridad**
En caso de resultados económicos negativos (pérdidas) del banco, **el valor/precio de cada CDA**, que es esencialmente coincidente con el valor neto contable de cada acción del banco, **se puede reducir y, por tanto, perder parte o todo el dinero invertido** ya que el valor de los CDA depende del valor patrimonial de Triodos Bank.

*...eblas perdi parton aŭ tuton de la investita mono...*

## *Triodos*

Banko *Triodos* estis fondita en 1980. Ĝi estas nun la plej granda etika kaj daŭrema banko en Eŭropo, ekzemplo por similaj iniciatoj. Ĝi havas la juran formon de akcia societo, kvankam laŭ multaj aspektoj ĝi similas al kooperativo.

Por garantii, ke la kapitalbazo restu stabila, ne eblas rekte aĉeti kaj vendi akciojn. La akciojn posedas fonduso. Investantoj aĉetas atestilojn (*certificaten*), kiuj ekvivalentas al akcioj kaj havas ties rajtojn (parton de la profito, voĉdonrajto) kaj riskojn (se pro iu kialo la akcioj perdas sian valoron, ankaŭ la atestiloj malplivaloriĝas). Estas la intenco, ke investanto dum longa periodo konservu sian investon – kontraste al „normalaj" akciuloj, kiuj povas ĉiutage ĵongli aĉetante kaj vendante sian akciojn.

Ekzistis interna vendosistemo per kiu eblis, se necese, vendi atestilojn. La valoro de atestilo respondis al la librotena valoro de akcio. Tiu sistemo dum longa tempo funkciis senprobleme, sed en iu momento ekestis multe pli da proponado ol da postulado. La respondeculoj de *Triodos* ne agnoskis la problemon, kaj en januaro 2021 ĝi devis ĉesigi la internan vendosistemon, kulpigante la pandemion. Plie, en decembro 2021 *Triodos* anoncis, ke ĝi reduktis la valoron de akcio/atestilo je 30 procentoj. Meze de 2023 ekfunkciis nova vendosistemo funkcigata de ekstera firmao. La prezo de atestilo ne plu dependis de la librotena valoro de akcio sed, kiel en borso aŭ aŭkcio, de la sumo, kiun pretas pagi la aĉetanto. Tio estis katastrofo: vendoj eblis, sed la akcio perdis du trionojn de sia valoro. Certe la pandemio parte kulpis, sed eble estas aliaj kialoj.



PIOTR SWAT / SHUTTERSTOCK.COM

Por stimuli la ekonomion (= devigi ŝparantojn elspezi sian monon) la Eŭropa Centra Banko post la banka krizo de 2008 enkondukis preskaŭ nulan renton, ne por mallonga periodo, sed por multaj jaroj. Tio neeviteble perturbis la profitmodelon de la banka sistemo. Ne estas konataj bankoj, kiuj kolapsis pro tio, sed certe iuj suferis, eble ankaŭ *Triodos*.

Temas ankaŭ pri la rolo de la estro de *Triodos* kaj la konstruo de nova ĉefoficejo. Pri tio estas multaj onidiroj, sed malmultaj kontroleblaj faktoj kaj apenaŭ io en la oficialaj komunikiloj de la banko.

Peter Blom (naskita en 1956) pasigis sian tutan profesian vivon ĉe *Triodos*, komence kiel volontulo, ekde 1989 kiel ĝenerala direktoro. En 2021 li demisiis (aŭ estis forigita). Nun li havas kelkajn (honoroficajn, sed prestiĝajn) funkciojn ekster la banko. Ŝajnas, ke li kondutis kiel guruo kaj estis la sola gvidanto. Ĉu li estis la instiganto, kiu konstruigis novan ĉefoficejon, respektantan ĉiujn eblajn ekologiajn normojn, sed ege multekostan? (Fotoserio estas en la retpaĝo de arkitektoj RAU, *www.rau.eu/portfolio/Triodos-bank-nederland/*.) Eble tio, kun aliaj faktoroj, malgrandigis la kapitalbazon de la banko ĝis danĝera nivelo kaj instigis al ne tute etika vendomaniero de akcioj de *Triodos*.

Nur per MONATO-manuskripto sendita al mi el Hispanio mi eksciis pri agresema, eĉ trompa vendado de atestiloj (en Hispanio nomataj „CDA") de *Triodos*-akcioj al klientoj. Vendo de akcioj de etika banko principe ne estas maletika, kondiĉe ke la vendanta bankoficisto bone klarigu la riskojn de akcioj kaj kontrolu, ĉu tia investo konvenas al la financa situacio de la kliento. Se efektive la meze investita sumo estas 20 000 eŭroj (do pluroblo por multaj klientoj), se oni asertis, ke ĝi estas tute sekura investo, se iuj familioj investis ĉiujn ŝparaĵojn en tio, plurloke okazis eraroj. En Belgio (kaj supozeble en tuta Eŭropa Unio) por tia investo la bankoficisto devas fari „investprofilon" de la kliento kaj kontroli ties financajn sciojn; pri tiu proceduro estas farata dokumento, printata kaj subskribata de la kliento. Ŝajne en Hispanio tio ne ĉiam okazis. Ĉu la kliento (eble nenion kompreninte) senpripense subskribis, kiel oni ĉiutage jesas al demando „ĉu vi akceptas kuketojn"? En la hispana CDA-informilo paragrafo klare mencias la riskojn (sed tio estas kelkaj linioj en plurpaĝa broŝuro, eble ne zorge legata).

En Nederlando kaj Hispanio (pri alia landoj mi ne scias) multaj klientoj opinias, ke ili estas trompitaj kaj plendis. Ĉu jura proceduro alportos solvon? Eble, post multaj jaroj, la banko devos pagi monkompenson, sed




PIOTR SWAT / SHUTTERSTOCK.COM

tio ankoraŭ pli malfortigos ĝin.

## BACOB kaj ARCO

La *Triodos*-afero pensigas pri belga financa skandalo el la epoko de la banka krizo de 2008.

*BACOB* estis kooperativa banko, kies origino troviĝas ĉe lokaj ŝparkasoj de la katolika laborista movado. *ARCO* estis la kupolo super *BACOB* kaj aliaj kooperativoj de la sama grupo.

Multaj membroj de kristanaj asocioj dum la dua duono de la pasinta jarcento aĉetis akcion de *ARCO* kaj pro tio ĝuis pli favorajn kondiĉojn ĉe *BACOB* kaj jaran dividendon (parton de la profito). Aĉetprezo de akcio egalis proksimume al monata salajro, ne ege granda sumo, per kiu oni iĝis kunposedanto de banko kiu liveras utilajn servojn al la propra socia klaso. Repago de akcio teorie eblis, sed apenaŭ okazis, ĉar kutime ĝi restis en la familio. Jure ĝi estis akcio, sed reale ĝi estis kvazaŭ dumviva membrokarto de asocio.

En 1997 *BACOB*, laborista banko, aĉetis la belgajn filiojn de *Paribas*, banko de la franca grandkapitalo. Sekvis aliaj strangaj transakcioj, nun konsiderataj malsaĝaj, sed en tiu epoko, kiam ĉiuj bankoj klopodis aĉeti aliajn bankojn, tute normalaj – la kontrolantaj instancoj silentis. En 2001 *BACOB* iĝis parto de la franc-belga grupo *Dexia*, kiu kolapsis en 2008-2011.

Por savi *Dexia*, en 2008 estis altruditaj al klientoj *ARCO*-akcioj kiel tute sekura investo, eĉ garantiataj de la ŝtato. Evidentiĝis, ke tio ne estis sekura investo kaj la ŝtata garantio estis promesita de kelkaj politikistoj, sed neniam realiĝis. Restas 800 000 belgoj kun senvaloraj akcioj. Lasta novaĵo pri (sensukcesa) jura proceduro estas el 2021.

## VDK

Same kiel Asteriks kaj Obeliks antaŭ du jarmiloj kun siaj samvilaĝanoj en fora Gaŭlio rezistis al la romianoj, komence de la nuna jarmilo en la belga urbo Gento kelkaj fieraj bankistoj rezistis al la tutmonda freneziĝinta bankaro.

Ilia banko nomiĝas *Volksdepositokas* (mallongigite VDK, popola deponkaso). Kiel *BACOB* ĝi ekestis el la kristana movado, sed pro iu nun forgesita kialo ĝi restis sendependa, kaj neniam estis *BACOB*-filioj en Gento kaj ĉirkaŭaĵo. Ĝi ne estis trafita de la bankokrizo de 2008, kaj ĝi nun iom post iom pligrandigas sian reton en la provincoj Orient- kaj Okcident-Flandrio, dum aliaj bankoj grandskale fermas filiojn. En 2020 ĝi transprenis la klientojn de *NewB*.

VDK nomas sin mem etika, sed por la klientoj plej gravas, ke ĝi pruvas, ke eblas esti bonfarta banko estante proksima kaj negranda.

## Ĉu eblas konkludo?

Pro la multaj postuloj de la klientoj kaj de la kontrolinstancoj, necesas ke banko estu sufiĉe granda por povi financi sian infrastrukturon. *NewB* pruvis, ke ne plu eblas fondi bankon kolektante kapitalon ĉe la publiko. Aliflanke banko ne iĝu tro granda kaj limigu sin al unu lando aŭ regiono. Bankestro en Nederlando ne povas scii kion faras oficisto en Barcelono.

Ankaŭ etika banko devas proponi ĉiujn kutimajn bankservojn. *Triodos* en Belgio ne estas sukceso, ĉar por kelkaj servoj familioj bezonas „grandan” bankon, kiu neeviteble iĝas la ĉefa banko.

Nur malmultaj klientoj fidas je sloganoj kiel „etika”, „verda” kaj „daŭrema”. Ili deziras bonan bankon.

Tamen, etikuloj, verduloj kaj obstinuloj rajtas havi sian propran bankon kaj ili estas sufiĉe multnombraj por sukcese krei ĝin, sed unue oni trovu solvon por librotena problemo: kiel kalkuli la valoron de akcio? Por akcioj, kiuj estas kvotataj en borso estas simple: la borskurzo indikas la valoron (nuntempe kutime fantazie altan). Por la bankokategorio pritraktita en ĉi tiu artikolo borso kaj spekulacio estas tabuaj. Baza valoro povas esti la aĉetprezo de la akcio, sed post unu jaro ĝi povas esti pli aŭ malpli; post dek jaroj certe estos konsiderinda diferenco. Sed kiom? Dek librotenistoj donos dek malsamajn nombrojn.

Belga ĵurnalisto verkis jenan konkludon sub artikolo pri alia aspekto de la sama temo: „Ĉe *Triodos* kaj *NewB* oni lernis, ke etika kaj daŭrema bankado kaj entreprenado fojfoje konfliktas kun la realo.” (Rik van Cauwelaert, *De Tijd*, 4 aŭg. 2023) ■



**Legu pri la sama temo la artikolon de Xavi Alcalde en la novembra numero, p. 14.**

BITLIBROJ

# PDF-libro: bela sed ne oportuna



PETRO PERUTSKYI / SHUTTERSTOCK.COM

*Libroj el bambuaj pecoj estis uzataj en antikva Ĉinio.*



**Liu** Xiaozhe (Solis)
korespondanto de Monato en Ĉinio, fondinto kaj administranto de reto.cn

Mi estas legema. Mi ĉiam legas, eĉ atendante aŭtobuson aŭ renkontiĝon. Kompare kun antikvaj ĉinoj, kiuj legis librojn faritajn per bambuaj pecoj, mi estas feliĉa pri la malpezaj paperaj libroj.

La evoluado de scienco kaj tekniko plifaciligas legadon. Poŝtelefonoj, bitlegiloj („legoplatoj" aŭ „poŝlegiloj") kaj aliaj ciferecaj aparatoj kun malgranda ekrano, kiujn oni povas facile kunporti kaj teni per unu mano, povas enteni pli ol mil librojn! En la reto estas multaj senpagaj aŭ malmultekostaj legaĵoj, kiujn oni povas elŝuti kaj legi per tiuj porteblaj aparatoj.

Bedaŭrinde, tamen, multaj homoj longe postiras la teknikon.

Rilate bitlibrojn, multaj homoj konsideras antaŭ ĉio nur la formon PDF. Multaj libroj kaj revuoj estas liverataj nur en tiu formo.

La formo PDF aperis en la jaro 1993, kiam ankoraŭ ne estis aparatoj porteblaj enpoŝe kun malgranda ekrano taŭga por legado.

Libroj aŭ gazetoj en PDF-formo estas tre belaj kaj aspektas kiel veraj paperaj legaĵoj en la komputilo aŭ tabulkomputilo. Sed legi dum longa tempo sidante antaŭ komputilo estas granda turmento al la korpo, speciale al la kolo, kaj tabulkomputilo ne estas tiel oportune kunportebla kiel poŝtelefono. Poŝtelefono kaj bitlegilo estas pli oportunaj por legi iam ajn kaj ie ajn.

## Mi neniam tralegas ĝin

Apud la papera eldono, UEA aperigas la revuon *Esperanto* ankaŭ en la formo PDF. Sed mi neniam tralegas ĝin, ĉar tiu formo havas gravan mankon: sur la eta ekrano ne eblas rompi la longajn liniojn kaj rearanĝi la paĝon. Legante librojn en malgranda ekrano, la leganto devas tiri la paĝon dekstren kaj maldekstren, refoje kaj refoje. Kvankam ekzistas programoj, kiuj pretendas rearanĝi la paĝon, ili ofte tamen miksas la alineojn kaj fuŝas la paĝon.

Hodiaŭ jam aperis kelkaj formoj de cifereca legaĵo, kiuj estas oportunaj por legado per malgranda ekrano. La plej simpla formo estas „TXT". Tio estas simpla teksto, sen formuloj, sen bildoj kaj tabeloj, sed ĝi estas rekte legebla per ĉiuj komputiloj, poŝtelefonoj kaj legiloj. Dissendante novelon, romanon, poemaron aŭ lernolibron, oni povas elekti tiun formon, por ke la verko atingu plej multajn legantojn.

Se vi dissendas gazeton kun fotoj, aŭ lernolibron kun tabeloj, eĉ sonoj, vi povas elekti la formon EPUB. EPUB estas nefermita normo: ĉiu povas fari librojn en tiu formo per senpagaj programoj. EPUB-libro estas legebla per komputilo, tabulkomputilo, poŝtelefono aŭ librolegilo. (Ankaŭ Kindlo – *Kindle* de Amazon – nun akceptas EPUB-libron: se oni alŝutas la libron en ĝusta maniero, ĝi konvertiĝas aŭtomate.)

Kun EPUB kaj TXT la paĝo aŭtomate rekompostiĝas laŭ la grandeco de la ekrano, do oni vidas la tutan frazon samtempe. Krome, eblas ankaŭ aŭtomate konverti de tiuj du formoj al multaj aliaj formoj, ekzemple MOBI, DOC, DOCX, RTF, AZW, CHM, PDF ktp. Fakte eblas konverti inter ĉiuj menciitaj formoj, escepte de PDF.

Hodiaŭ, laŭ mia scio, el la famaj esperantaj gazetoj, nur Monato kaj *La Ondo de Esperanto* havas version EPUB.

PDF bone funkcias sur komputila ekrano, sed ĝi estas maloportuna sur la malgrandaj ekranoj de aktualaj modernaj aparatoj. Farante bitlibrojn aŭ gazetojn, oni konsideru unue la legeblecon super la aspekta beleco. ■

MARVETURADO

# Ŝipo de Hundertwasser

Renate kaj Walter Klag
korespondantoj de Monato en Vieno

*La ŝipo* Regentag *simbolas gravan parton de la vivo de Hundertwasser.*




HUNDERTWASSER.COM

La ŝipo *Regentag* (pluvtago) staras en Danubo ĉe la urbo Tulln, je 40 km okcidente de Vieno. La ŝipo apartenis al la universala artisto Friedensreich Hundertwasser [frídensrajĥ húndertvasa]. Li laboris ne nur kiel pentristo kaj grafikisto, sed ĉefe kiel arkitekto (vd. Monaton, 2000/07, p. 12).

Liaj lernojaroj pri arkitekturo komenciĝis per marveturado post aĉeto de la transportŝipo *San Giuseppe T* en 1968 en Palermo (Italio). De 1968 ĝis 1974 li rekonstruigis la ŝipon kaj nomis ĝin *Regentag*. Hundertwasser loĝis kaj pentris sur ĝi dum dek jaroj.

## Interesiĝo pri ŝipoj ekde infanaĝo

Jam kiel infano Hundertwasser interesiĝis pri ŝipoj. En liaj pentraĵoj oni vidas ŝipojn, bovokulojn kaj kamentubojn.

Hundertwasser rimarkis, ke pluvo igas la kolorojn en la naturo brilegi. Li amis la pluvon kaj diris, ke pluvtagoj estas labortagoj. Por li pluvtago estas bona tago. Li diris: „Kiam pluvas, mi estas feliĉa”. Post la rekonstruado

la ŝipo *Regentag* el birda perspektivo aspektis kiel longforma luma guto.

La aĉetita ŝipo, kiu poste ricevis la nomon *Regentag*, estis sicilia-tunizia ligna motorŝipo por transportado de salo. Oni konstruis ĝin en la jaro 1910. Ĝia longeco estis 11,9 m, larĝeco 3,85 m, mergiĝo 1,17 m kaj volumeno 12,39 toneloj. Ekde 1968 la ŝipo estis rekonstruata dum sep jaroj, kiuj estis por Hundertwasser unuaj praktikaj arkitekturaj lernojaroj. Ĉe li estis similaj problemoj kaj diskutoj kiel dum la posta domkonstruado. *Regentag* ŝajne estis la unua realigita arkitektura projekto de Hundertwasser.

La artisto plilongigis la ŝipon de 11,9 m al 16,6 m, plivastigis la karenon al 4,5 m de larĝeco kaj al 4,65 m de alteco. Li starigis du mastojn, nove restrukturis la pruon kaj pobon kaj figurigis la supraĵon kreive kaj nesimetrie.

## Veturo al Nov-Zelando

Por elprovi la martaŭgecon de la ŝipo Hundertwasser entreprenis rondveturon en Mediteraneo. Post la sukcesa testo *Regentag* veturis senprobleme dum 18 monatoj de 1975 ĝis 1976 sub la estrado de kapitano Horst Wächter de Venecio tra Malto, Ĝibraltaro, Karibio, Panamo, Galapagoj kaj Tahitio al Nov-Zelando.

Dum tiuj marveturoj ankaŭ Hundertwasser estis kapitano surŝipe. Li ricevis licencon de ŝipestro nur kelkajn monatojn post la aĉeto de *Regentag* en Palermo.

En 1995 la ŝipo dronis. Post la savo oni renovigis ĝin de 1999 ĝis 2000 en Opua ĉe Bay of Islands en la nordo de Nov-Zelando. Ĝi ricevis kovraĵon el cemento. Krome la linio, kie la akva surfaco tuŝas la ŝipon, estis tegita per kaheloj.

La 19an de februaro 2000 Hundertwasser mortis kaj estis enterigita en sia propra terposedaĵo en Nov-Zelando. Li eterne ripozas en sia „Ĝardeno de la Feliĉaj Mortintoj" sub tulip-arbo en Kaurinui.

Post lia morto oni transportis *Regentag* en kontenera ŝipo de Nov-Zelando al Hamburgo kaj poste per kamiono al Tulln en Aŭstrio. Tie la ŝipo estis eksponata en 2004 kadre de la ekspozicio „Hundertwasser: Arto, homo, naturo" en la iama minoritana monaĥejo. En 2015 ĝi fariĝis oficiale protektata monumento.

La ŝipo *Regentag* simbolas gravan parton de la vivo de Hundertwasser. Dum dek jaroj li loĝis kaj pentris sur ĝi. La ŝipo estis lia hejmo kaj ĉefa sidejo. Krome ĝi estas rimarkinda naŭtika verko de la artisto, kiu aktivis en multaj kampoj. ■

ALBANIO

# Pliiĝis la nombro de eksterlandaj vizitantoj



Bardhyl Selimi
korespondanto de Monato en Albanio

Somere venas multaj turistoj al la malgranda Albanio, kies naturo estas ankoraŭ parte virga. Post la falo de la komunisma reĝimo en 1991 la lando tute malfermiĝis al la cetera mondo.

Dum la lastaj jaroj estas pli granda nombro de eksterlandaj turistoj ne nur sur la plaĝoj, en la montaro, sed ankaŭ en la ĉefurbo Tirano, kiu spertas tre rapidan ŝanĝiĝon. Tio dankindas ankaŭ al la fakto, ke Albanio ĝuas bonan famon internacie. Do por la jaro 2022 oni proklamis Tiranon „ĉefurbo de junularo", kaj por 2023 „ĉefurbo de sporto".

## Plej multaj turistoj venas el Italio

Plej multas la vizitantoj el la najbara Italio, kiu situas nur 200 km for de la albana marbordo. Oni preferas, krom la kulturo kaj plaĝoj, ankaŭ kuraci dentojn, eviti impostojn kiel entreprenistoj, studi en la universitato „Sinjorino de Bona Konsilo", kies diplomoj estas agnoskataj en Eŭropo.

Ne mankas ankaŭ turistoj el aliaj ŝtatoj, eĉ el arabaj kaj aziaj landoj. Ĝis februaro 2022 venis ankaŭ rusoj, kiuj ne bezonis vizon. Plej granda estas la nombro de albanaj vizitantoj el Kosovo, Nord-Makedonio kaj el la albana diasporo.

## Tirana kvartalo „Bloko"

Unu el la allogaj lokoj, vizitata de preskaŭ ĉiuj turistoj, estas la kvartalo de Tirano nomata „Bloko". En ĝi loĝis altrangaj funkciuloj de la komunisma partio. La kvartalo ampleksas belajn vilaojn kaj ĝardenojn, gardatajn antaŭe de soldatoj. Inter la konstruaĵoj estis ankaŭ la domo de la familio de la komunisma diktatoro Enver Hoxha [hoĝa]. „Bloko" iĝis malfermita por vizitoj post 1991. En la kvartalo oni konstruis multajn multetaĝajn domojn, kafejojn, restoraciojn, oficejojn k.a. ■

OPINIO

# Al kiu Dio preĝas Kiril?



Alberto García Fumero
korespondanto de Monato en Kubo



*Kiril, la gvidanto de respektinda kristana konfesio, la rus-ortodoksa, pravigas la senhontan invadon de Rusio en Ukrainion.*

DUMA.GOV.RU

Pli ĝuste dirite: al *kia* Dio? Kiel eblas, ke en la 21a jarcento Kiril, la gvidanto de respektinda kristana konfesio, la rus-ortodoksa, pravigas la senhontan invadon de Rusio en Ukrainion? Ĉu hazarde li ne aŭskultas tiun Evangelion, kiun li mem legas kaj eksplikas dum ĉiu meso?

Jen demandoj, kiujn faras al si mem simpla laiko, alkutimiĝinta de jaroj helpi surtabligi manĝaĵojn por bezonuloj kaj regule preĝi por paco kun gefratoj el la plej malsamaj religioj kaj konfesioj, ankaŭ el la rusa ortodoksa eklezio.

Indulgu min, se vi povas; same kiel faris mia antaŭulo, pastoro Berveling, mi provas montri en nia rubriko la riĉon, kiu fontas el la spirita vivo de diversaj konfesioj kaj religioj, kaj – kial ne? – eĉ de nekredantoj. Ĉiuj senescepte serĉas kaj bonon kaj pacon. Tial vere estas ŝoko, almenaŭ por mi, trovi, ke supozeble seriozaj homoj, homoj taskitaj gvidi la spiritan vivon de tuta eklezio, tiel ne agas.

## Devigo

Politikistoj ne levas al Dio hostion, ne petas la Dian benon sur panon kaj vinon. Ili mensogu aŭ estu honestaj; por ili ne estas ia devigo. Sed religia gvidanto ja devas esti honesta.

Tia apogo de kristanismo al militoj estis iel pravigebla en la pasinteco, en la tempo de imperioj, kiam ankoraŭ ne estis bone enkapigita tio, kion la evangelioj instruas. Ne nun, post la hororoj de du mondmilitoj. Ne en la nuntempo, kiam niaj armiloj kapablas ekstermi popolojn, detrui la planedon.

Ĉu ne sufiĉas, ke pro malsato suferu miloj da homoj? Ĉu ne sufiĉas poluado, senarbarigo, malsanoj, troa ekspluatado de resursoj? Ĉu oni aldonu detruadon de lando, nome de ia religia pravigo? Ĉu hazarde oni pretendas ridindigi, misfamigi kaj altiri malamon sur Tiun, kiu predikis amon kaj pacon?

## Strangaĵoj

Ŝajne io misiras ĉe eklezio tiel gvidata. Antaŭ nelonge, laŭ ĵurnala raporto, popoj (rusaj ortodoksaj pastroj) benis statuegon je Stalino. Nun la patriarko elpelas el la pastra ofico sian iaman sekretarion, pro tio ke tiu protestas kontraŭ la invado. Ĉu hazarde li kredas, ke Rusio estas lando speciale benata kaj taskita konkeri siajn najbarojn?

Krom tio, ke temas pri milito, kiun oni ne rajtas tiel nomi pro risko de enkarcerigo, kelkaj el la argumentoj distrumpetataj por pravigi la militon estas simple absurdaj. Kolego, provante pravigi la invadon, iam diris al mi: „Ĉu vi scias, ke tiuj teritorioj iam apartenis al Rusio?”. Mi respondis nur: „Ĉu vi konsentus pri invado fare de Hispanio pro tio, ke nia lando iam en la pasinteco apartenis al ĝi?” Kompreneble ne estis respondo … Al mi tio sufiĉas, juĝista moŝto, dirus iu ajn.

Apostolo Petro amare ploris, kiam li trifoje malagnoskis la Sinjoron. Kiom da novaj Petroj devos iam, estonte, verŝi larmojn? ■



ЕВГЕН КОВТОНЮК

Detruita domo en Kijivo.

KULTURO KAJ MILITO

# Muzeoj de Ukrainio en la milito (2014-2023)

Svitlana **Havriljuk** (Світлана **Гаврилюк**)
kaj Nina **Daniljuk** (Ніна **Данилюк**)

La problemo de defendo de la muzeaj kolektoj en Ukrainio aperis en la jaro 2014, kiam Rusio kontraŭleĝe aneksis parton de la ukrainia teritorio: la duoninsulon Krimeo (formale) kaj la regionon Donbaso (fakte). Ĝi fariĝis pli akra post la 24a de februaro 2022, kiam komenciĝis la plenskala milito kaj kiam la rusia armeo invadis Ukrainion. La tiama vic-ministrino pri kulturo kaj informado en Ukrainio, Katerina Ĉujeva, ekde la unuaj tagoj de la milito substrekis la danĝeron por ĉio: paleolitikaj memoraĵoj kaj nuntempaj artobjektoj, muzeaj ekspoziciaĵoj kaj diversaj konstruaĵoj. Ŝi atentigis pri ebla prirabo kaj forpreno de la muzeaj kolektoj al Rusio.

## Amaso de detruitaj kulturaj objektoj

Laŭ oficiala informo antaŭ la milito funkciis pli ol 500 muzeoj kaj 65 historiaj-kulturaj rezervejoj. Al la Monda Heredaĵo de Unesko apartenas 7 ukrainiaj memorobjektoj. Komence de 2023 en Ukrainio oni nombris jam 242 detruitajn kulturajn objektojn. Inter ili estas plene detruitaj aŭ difektitaj 35 historiaj kaj arkitekturaj objektoj, 29



Nacia palaco Ukrainio en Kijivo kun difektitaj fenestroj.



La protektata monumento je Sankta Volodimir en Kijivo, julio 2022.

memormonumentoj de la 19-21a jarcentoj, 19 konstruaĵoj, muzeoj kaj rezervejoj. Ekzemple en la urbo Ĉernihiv estis pripafita la muzeo kaj domkonstruaĵoj de la ukraina verkisto Miĥajlo Kocjubinskij, la regiona artmuzeo Hrihorij Galagan, la milithistoria muzeo, la muzeo de ukrainaj antikvaĵoj, kiu troviĝas en la memordomo de Tarnavskij de la 19a jarcento. En la kijiva regiono estis detruita loka historia muzeo en la vilaĝo Ivankove, en kiu estis konservita la artkolekto de la popola artpentristino Marija Primaĉenko. La 28an de februaro 2022 en la ducentjaran konstruaĵon de la muzeo trafis rusia kuglego kaj ekbrulis fajro. Riskante siajn vivojn, lokaj loĝantoj kaj muzeaj dungitoj savis parton de la kolekto (10 bildojn el pli ol 20), broditajn tukojn de la metiistino Hanna Veres, fotoalbumojn, mastrumaĵojn, kiuj estis en la ekspozicio. Ĉio, kion ili ne sukcesis elpreni, plene forbrulis.

En la urbo Buĉa, kie la invadantoj detruis multajn domojn, prirabis kaj mortigis centojn da civiluloj, estis difektita la arkivo de la ukraina politikisto Vjaĉeslav Ĉornovil, iama membro de la Ukraina Helsinka Unio (homrajta organizaĵo, kiu defendis viktimojn de politikaj subpremoj en Sovetio). Li estis popola deputito kaj en 1999 kandidatiĝis por la posteno de prezidento de Ukrainio, sed post aŭto-akcidento li ne pluvivis.

## Mariupol kaj aliaj okupitaj urboj

La situacio estas precipe kompleksa en la urboj, kiujn portempe okupis la „raŝistoj"[1]. Ekzemple en la urbo Sankta Marija multaj muzeoj estis prirabitaj kaj iliaj konstruaĵoj nun iĝis ruinoj. Rusiaj bomboj detruis la Ŝtatan Artmuzeon de Mariupol, situantan en konstruaĵo de la komenco de la 20a jarcento. En 2010 tie estis malfermita artmuzeo kun verkoj de la grekdevena pejzaĝisto Arĥip Kuinĝi, kiu loĝis en la urbo fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento. La posedaĵoj de la muzeo inkludis pentraĵojn, dekoracian kaj aplikatan arton, grafikon kaj skulptaĵojn. Krome la okupantoj forprenis pli ol 2000 unikajn ekspoziciaĵojn de la mariupolaj muzeoj. Inter ili estas pentraĵoj de la mondfamaj artistoj Ivan Ajvazovsjkij, Arĥip Kuinĝi, Mikola Dubrovsjkij, Mikola Hluŝĉenko, Tetjana Jablonsjka, unika kolekto de medalionarto.

La konstruaĵoj de la Muzeo de Loka Historio en la urbo Oĥtirka (regiono Sumi), la Nacia Muzeo de Hrihorij Skovoroda (Ĥarkiva regiono), la Ĥarkiva Artmuzeo kaj la Melitopola Muzeo de Loka Historio (Zaporiĵĵa regiono) estis detruitaj, iliaj ekspoziciaĵoj estis difektitaj aŭ prirabitaj.

## Damaĝoj en Kijivo

La 10an de oktobro 2022 pluraj kulturaj kaj edukaj institucioj estis damaĝitaj en la historia centro de la ĉefurbo Kijivo rezulte de rusia bombardado. Plejparte ĉi tiuj estas arkitekturaj monumentoj de la 19a kaj frua 20a jarcentoj: la

1. Raŝisto: neologismo (prononco de la angla vorto *Russia* [raŝa] + faŝisto), kiu aperis en la jaro 2022, post la komenco de la plenskala rusia-ukrainia milito.

Domo de Instruistoj, la Nacia Muzeo de Arto Bohdan kaj Varvara Ĥanenkoj, la Muzeo de Taras Ŝevĉenko, la konstruaĵoj kaj la biblioteko de la Kijiva Nacia Universitato Taras Ŝevĉenko, Kijiva Arta Galerio, Muzeo pri Naturhistorio kaj Muzeo de Kijivo, apartamentaj muzeoj de la eminentaj verkistoj Pavlo Tiĉina kaj Mikola Bajan, la Nacia Filharmonio de Ukrainio kaj la Ukraina Domo. La nomitaj muzeoj havas tre valorajn kolektojn. Ekzemple, en la Nacia Muzeo de Arto estas granda kolekto, kiu prezentas signifajn artaĵojn de Eŭropo, Azio kaj la Antikva Mondo. Ĝi estas fondita en 1919 en du konstruaĵoj de la 19a jarcento. Kiel rezulto de la eksplodo estis detruitaj la tegmentoj kaj la fenestroj en ambaŭ domoj, la konstruaĵoj de aliaj muzeoj estis difektitaj. En la konstruaĵoj de la universitato, fenestroj kaj pordoj estis krevigitaj, parto de la klasĉambroj kaj la katedroj (la ĉambroj por instruistoj laŭ fakoj, inter ili la katedro pri rusa lingvistiko) estis detruitaj.

## Streboj por savi valoraĵojn

En februaro 2022 multaj muzeoj en Ukrainio fermis siajn pordojn. La direktoro de la Odesa Arta Muzeo, Oleksandra Kovalĉuk, diris, ke granda teamo de esploristoj, gvidistoj, projektestroj kutimis labori en la muzeo, sed nun ilia nombro multe malpliiĝis. Iuj iris al okcident-eŭropaj landoj por trejnado aŭ provizore estis dungitaj. Kiam la milito eksplodis, la ĉefa ekspozicio estis forigita por konservi valorajn ekspoziciaĵojn.

Estas bone, ke granda parto de la ukrainaj muzeoj sukcesis porti la plej valorajn kolektojn al sekuraj lokoj. Precipe, la oficistoj de la en Ukrainio unua Muzeo de Volinia ikono, kiu reprezentas la unikan regionan lernejon de volinia ikonpentrado (malfermita en 1993 en Lucjk, Okcidenta Ukrainio), faris ĉion eblan por konservi sian kolekton. La kolekto de la muzeo inkludas pli ol 1500 monumentojn de sankta arto, inter ili pli ol 600 ikonojn de la 16a ĝis la 19a jarcentoj, metalaĵojn (ikonoroboj, preĝejaj iloj, ikonetoj), dekoraciajn ĉizaĵojn („reĝaj pordegoj", ikonŝrankoj ktp) kaj skulptaĵojn. En aparta halo de la muzeo dediĉita al la Mirakla Ikono de la Dipatrino de Ĥolmo (la plej malnova ligna ikono de la 11a jarcento) kopio de ĝi estas nun elmontrata. Ĉi tiu ikono estas respektata de ortodoksuloj kaj katolikoj, precipe de ukrainoj el la regiono Ĥolm, tial ĉi tie okazas ne nur ekskursoj, sed ankaŭ diservoj (la honora tago de la Virgulino de Ĥolmo – la naskiĝfesto de la Dipatrino, la 21a de septembro). Plej multajn el la ekspoziciaĵoj de tiu muzeo dum la milito oni konservas en stokejo. Same estas en alia unika muzeo pri la historio de la „Lucjka Frataro" (17a–21a jc.). Ĝi estis malfermita en 2011 en la iama „frata monaĥejo" en la urbo Lucjk. „Lucjka Frataro" estis nacia kaj religia organizaĵo de la urbanoj, fondita en 1617. La raraĵoj de la muzeo estas: malnovaj presaĵoj de la 17a–19a jc., dokumentoj pri financa agado, la metrikaj libroj de la preĝejo Ĥrestovozdviĵensjka k.a. Malgraŭ la milita tempo, ambaŭ muzeoj okazigas ekspoziciojn de siaj fondusoj.

Laŭ decido de internaciaj organizaĵoj estas kreita speciala centro: Iniciato de Urĝa Savo de Heredaĵo (*Heritage Emergency Response Initiative* – HERI). Ĝi helpas al ĉiuj muzeoj, kiuj ne havis tempon kaj monon por preni siajn kolektojn por konservado. La Nacia Muzeo de la Revolucio de Digno, kiu estas kreita en novembro 2015 en Kijivo por eternigi la memoron pri la herooj de EŭroMajdano, ellaboris „instrukciojn pri rapida respondo por muzeoj en la zono de militaj operacoj, armilaj konfliktoj, terorismaj atakoj kaj en aliaj krizaj situacioj". Krome, funkcias Muzea Kriza Centro en Ukrainio, fondita laŭ iniciato de Olha Honĉar, direktorino de la muzeo „Teritorio de Teroro" en Lviv. La centro helpas al malgrandaj institucioj kaj iliaj dungitoj, kiuj ne havas proprajn rimedojn por evakuado. Prioritato estas donata al muzeoj de urbetoj kaj vilaĝoj en la oriento kaj sudo de Ukrainio.

## Kulturo plu vivas

Malgraŭ la milita tempo, muzeaj oficistoj tamen strebas organizi ekspoziciojn kaj inviti vizitantojn. Precipe, en la Muzeo pri Moderna Ukraina Arto de Korsakoj en la urbo Lucjk (ĝi estas unu el la plej ampleksaj artgalerioj en la lando), la 24an de aŭgusto 2023, en la Tago de Sendependeco de Ukrainio, malfermiĝis la plej fundamenta arta projekto de la jaro 2023 „Kosmogonio de Sencoj". Ĝi estas parto de la moderna arta projekto „Kosmogonio", kiu daŭras ekde novembro 2022 kaj enhavas la kreadon fare de la artisto Petro Antip de la plej granda pentraĵo en la mondo (proksimume 2000 kvadrataj metroj). Pli ol 500 artobjektoj de 300 artistoj el multaj regionoj de Ukrainio estas elektitaj por partopreni en la projekto „Kosmogonio de Sencoj". La gajnintoj havis la okazon prezenti siajn verkojn en la ekspozicio, interparoli kun Petro Antip – Honora Artisto de Ukrainio, naskita en la nuntempe okupata urbo Horlivka en la donecka regiono, kaj kun partoprenantoj en la aranĝo. Ĉi tiu ekspozicio, same kiel la tuta projekto, estas la rezulto de pripenso pri la hodiaŭaj eventoj, ma-

nifestiĝo de la kreiva unueco de ukrainaj artistoj, ilia arta forto, serĉado de novaj kosmogoniaj signifoj celantaj konservi nian planedon Tero en la tempo de tutmondaj katastrofoj.

## Bezonataj reagoj

La muzeoj de Ukrainio entute estas do en tre malfacila situacio dum la milito. Fakuloj opinias, ke la agoj de la okupantoj, celantaj detrui kaj prirabi ukrainajn muzeojn, estas parto de strategio por detrui la ukrainan kulturan identecon. Hodiaŭ, internacia sperto pri konservado de muzeaj valoroj estas grava por nia lando. Estas bezonata adekvata reago de la internaciaj organizaĵoj al la agoj de la raŝistoj. Tio helpos transdoni al la venontaj generacioj la kulturan trezoron de Ukrainio, kiu estas tre valora por la tuta monda kulturo. ■

**Світлана Гаврилюк** (Svitlana Havriljuk) estas doktoro pri historiaj sciencoj, estro de la katedro pri muzeaj kaj memorstudoj, informa kaj analiza agado en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato en Lucjk, Ukrainio kaj **Ніна Данилюк** (Nina Daniljuk) estas doktoro pri filologiaj sciencoj, profesoro de la katedro pri ukraina lingvo kaj lingvodidaktiko en la sama universitato.

MUZIKO

# Interesa sentokaoso

Antônio **Cavalcante**

*Sentokaoso*, la dua albumo de la duopo *ĴeLe*, aperis en 2013. Ĝi konsistas el dek kantoj, kaj nun, kiel estas skribite sur la retpaĝo de la eldonejo, reaperas laŭ la kutimaj bit-formoj disponeblaj ĉe *Vinilkosmo*.

Ne estas facile verki kantojn en tiu ĉi ĝenro. Kelkajn mi ŝatis, sed aliaj faris malpli bonan impreson.

La unua kanto *Muzo* plaĉas al mi, ĉar en ĝi tuj estas sentebla solida etoso. La samon mi povas diri pri *Diru al mi*, kvankam ĝi ŝajnas malpli sukcesa. La akompano faras tro monotonan impreson.

Ankaŭ en la tria kanto *Sentokaoso* la ruĝa fadeno estas la etoso, al kiu kontribuas la akompano.

La kvara kanto *Nun liberas mi* aparte al mi plaĉas. Tio estas vigla, varietosa muziko.

Poste la muziko iĝas eĉ pli bona. Ekzemple la kvinan kanton *Tango de amoro* mi povus aŭskulti multfoje sinsekve.




*Diablotango* estas iom stranga kanto, mi devis alkutimiĝi al ĝia etoso. Malgraŭ tio, mi aŭskultas ĝin kun intereso.

*Duonkore* bone komenciĝas. La etoso al mi plaĉas, sed ŝajnas, ke al kelkaj momentoj io mankas, por ke mi povu reagi al la rezulto senrezerve favore.

Bedaŭrinde *Mia steleto* ne elvokis emociojn. Mi pensas, ke mankas al ĝi tiu energio kaj tiuj surprizoj, kiuj abundas en aliaj kantoj de ĉi tiu disko.

*Nur ĝojo* sonas bele, sed mi ne dirus, ke tiu ĉi kanto estas inter la plej bonaj de la disko. Tie ĉi la kantado ne tre plaĉas al mi.

La lasta ero *Vivo* komenciĝas bone kaj interese, sed ŝajnas, ke por tia kanto la voĉo de la kantistino ne tre taŭgas. Disrevigas min, ke en la kantoparto ne estas vera melodio, kiu komenciĝas, evoluas kaj finiĝas.

Resume: *Sentokaoso* estas interesa kolekto de kantoj. Ĝi havas siajn fortajn kaj malpli fortajn flankojn. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi disko estas pli bona ol la unua. Estos interese ekscii, kiel evoluis tra la jaroj la repertuaro kaj la kantado kaj ludo de la duopo *ĴeLe*. ■

# Kiel pagi vian abonon de Monato

V.23-12

## Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton tra nia sekura servilo: https://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo.php.
- Per PayPal al paul_peeraerts@esperanto.be.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## Tarifoj

| Ŝtato de la paganto | | surface | aere | bite |
|---|---|---|---|---|
| Argentino | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Aŭstralio | AUD | 109 | 112 | 61 |
| Aŭstrio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Belgio | EUR | 66 | - | 37 |
| Bosnio-Herc. | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Brazilo | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Britio | GBP | 57 | 59 | 33 |
| Bulgario | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Ĉeĥio | EUR | 56 | 58 | 34 |
| Ĉinio | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Danio | DKK | 490 | 508 | 276 |
| Estonio | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Finnlando | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Francio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Germanio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Grekio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Hispanio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Hungario | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Irlando | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Islando | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Israelo | EUR | 59 | 62 | 33 |
| Italio | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Japanio | JPY | 10400 | 10800 | 5900 |
| Kanado | CAD | 95 | 98 | 55 |
| Kipro | EUR | 56 | 58 | 34 |
| Koreio | EUR | 59 | 62 | 33 |
| Kostariko | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Kroatio | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Latvio | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Litovio | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Luksemburgo | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Malto | EUR | 56 | 58 | 34 |
| Meksiko | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Nederlando | EUR | 66 | 68 | 37 |
| Norvegio | NOK | 745 | 770 | 420 |
| Nov-Zelando | NZD | 115 | 120 | 65 |
| Pollando | PLN | 220 | 226 | 125 |
| Portugalio | EUR | 59 | 62 | 33 |
| Rusio | EUR | [40] | [43] | 23 |
| Serbio | EUR | 40 | 43 | 23 |
| Slovakio | EUR | 47 | 49 | 27 |
| Slovenio | EUR | 56 | 58 | 34 |
| Sud-Afriko | EUR | 59 | 62 | 33 |
| Svedio | SEK | 760 | 790 | 430 |
| Svislando | CHF | 82 | 88 | 49 |
| Usono | USD | 78 | 82 | 47 |

## aŭ pere de peranto ...

▸ **Aŭstra**: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. IBAN AT80 6000 0000 0712 7744. Rete: aon.913548977@aon.at.

▸ **Belga**: Vlaamse Esperantobond, Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen (IBAN BE66 0000 2653 3843 BIC BPOTBEB1). Rete: financo@fel.esperanto.be.

▸ **Bosnia kaj hercegovina**: Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698 Rete: info@esperanto.ba.

▸ **Brazila**: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301/303, Brasília - DISTRITO FEDERAL, 70393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

▸ **Ĉeĥa**: Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III, tel. 723 672 335. Konto banko: Equa bank - 101 953 9617/6100. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

▸ **Ĉina:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jingchuan-Xian Jinqiao Guoji, 744300 Pingliang, Ĉinio. Poŝtel.: +86 18893316800. Rete: trezoro@qq.com.

▸ **Dana**: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv. DK-2100 København Oe. Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Rete: arnecasper@yahoo.com.

▸ **Estona**: Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

▸ **Finna**: Tiina Kosunen. Rete: cefdelegito@esperanto.fi.

▸ **Franca**: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (IBAN FR76 4255 9000 0941 0200 1388 731 BIC CCOPFR-PPXXX). Rete: esperanto-france@esperanto.org.

▸ **Germana**: Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Rete: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.

▸ **Hispana**: Jose M. Rodríguez Hernández, Apartado de Correos 3142, E-14080 Cordoba. Rete: ueaperanto@esperanto.ac.

▸ **Irlanda**: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

▸ **Islanda**: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

▸ **Israela**: Jehoŝua Tilleman, 97-A Dereĥ-Akko, IL-2637324 Kirjat Mockin. Rete: b48705544@013.net. Telefone: (04) 8 70 55 44.

▸ **Itala**: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Rete: feisegreteria@esperanto.it.

▸ **Japana**: Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

▸ **Kanada**: Kanada Esperanto-Asocio, p/a Raymond Brisebois, kasisto, 414-110 Grand Ave. London, ON N6C 1L8. Rete: rjlbca@yahoo.ca.

▸ **Kataluna**: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08204 Sabadell. Rete: perado@esperanto.cat.

▸ **Korea**: Korea Esperanto-Asocio, 464-ho, 217 Toegye-ro, Jung-gu, Seulo 04558. Rete: kea@esperanto.or.kr.

▸ **Kostarika**: Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Rete: miaumiau@ice.co.cr

▸ **Kroata**: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.

▸ **Litova**: Laimius Strażnickas, LEA, a.k. 178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Rete: laimiuslt@gmail.com.

▸ **Luksemburga**: LEA, 2, om Klaeppchen, 5682 Dalheim (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Rete: brian.moon@gmx.com

▸ **Norvega**: NEL, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo. Rete: oficejo@esperanto.no.

▸ **Nov-Zelanda**: David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, Nov-Zelando. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

▸ **Pola**: Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XV O/Wwa. Rete: dankaleyk@gmail.com.

▸ **Portugala**: Portugala Esperanto-Asocio / Associação Portuguesa de Esperanto, Praceta Humberto Delgado, 1-B, Monte Abraão, PT-2745-318 Queluz SNT. Rete: portugala@esperanto.web.pt.

▸ **Ruslanda**: Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Rete: sezonoj@kanet.ru.

▸ **Serba**: Zoran Čirić, Branka Miljkoviča 14, 18000 Niš, poŝtel. +381-63-7200 616. Rete: zciric2@gmail.com.

▸ **Slovaka**: Peter Baláž - ESPERO, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. Tel. +421 902203369, rete: petro@ikso.net.

▸ **Slovena**: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.

▸ **Sud-Afrika**: Colin Beckford, 011 Riverside Place, Alnwick Road, DIEP RIVER, 7800. Rete: cbeckford@telkomsa.net.

▸ **Sveda**: Sveda Esperanto-Federacio, c/o Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: svenska@esperantoforbundet.se.

▸ **Svisa**: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

▸ **Usona**: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Rete: elna@esperanto-usa.org